


# EL POPOLA ĈINIO

中國報道 1979 1





La ŝipo "Changxiu"

La nomita ŝipo 7000-tonela estas farita de nia lando mem. Ĝi funkcias inter Ŝanhajo kaj Kingdaŭ ekde la jaro 1974. La ŝipo havas pli ol 800 litojn kaj ankaŭ restoracion, legoĉambron, butikon, disaŭdigan ĉambron kaj kuracejon. La servado estas bona kaj veturado per ĝi estas tre agrabla.



Sur ferdeko

Jen la celloko estas videbla.



En legoĉambro

Servado al pasaĝeroj





# Ĉiam verda brigado

Arbarprotektado


Dapaŭ-taĉmento de Dagang-komunumo, Guanghi, sin trovas apud montoj kaj riveroj, kaj renomiĝas pro sia abunda produkto de sekvojo kaj bambuo. La taĉmento ĉiujare faras forstumadon kaj donas grandan atenton al protektado de arbaro. Ĝis la jarfino de 1977, la taĉmento verdigis 147 montpintojn, kaj ĝia arbara areo atingis 526 hektarojn. Ĝi vendis al la ŝtato 700 kubmetrojn da ligno en 1966 kaj ĉijare 1,600 kubmetrojn.



Sterkoportado

Bambuaro







Flosado

# Fotisto Jaŭ Gincaj

La fotisto Jaŭ Gincaj estas lerta en tekniko kaj fervora en servado al klientoj, pro kio li estas multe respektata de la amasoj. Li, 55-jara, okupiĝis pri fotografado jam 41 jarojn, kaj nun li laboras en la Ĉina Fotejo ĉe Vangfuging-strato. Dank' al longa praktikado, li lertas fari fotojn laŭ aĝo, profesio kaj aliaj karakterizaĵoj de klientoj, tiel ke la fotoj povas montri ne nur ilian aspekton sed ankaŭ spiriton.

La oficiala foto de nia forpasinta Ĉefministro Ĝou Enlaj estas farita de Jaŭ Gincaj (Vidu la 3-an numeron de 1976 de EPC). La foto estas harmonia en lumo kaj ombro, riĉa en nuancoj kaj kun forta versimileco kaj reliefo. Rigardante ĝin, vi sentas kvazaŭ la ĉefministro ĉiam rigardus vin kun profunda sento, kaj la vizaĝo graseta ĉiam kun rideto aspektas tiel intima kiel serioza, tiel firma kiel afabla. La foto tre fidele prezentas la brilan figuron de nia Ĉefministro Ĝou Enlaj.

K-do Jaŭ senfine klopodas por altigi sian teknikon, kaj akiris sukcesojn en sia ordinara laborposteno. En 1959 li estis honorita per la titolo de unuaklasa fotisto, kaj elektita poste kiel membro de la konstanta komitato de la Fotista Societo. En februaro de 1977 li havis honoron ĉeesti la Kvinan Tutlandan Kongreson de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj partoprenis kiel observanto en la Kvina Tutlanda Popola Kongreso. Li decidis daŭre pli bonigi sian servon al la klientoj, sub la gvido de Prezidanto Hua.


Jaŭ Gincaj (meze) kaj liaj metilernantoj





Elektitaj fotoj



En fotado









En preteco

# EL POPOLA ĈINIO

中國報通

1979

N-ro 1

(244)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

## SUR LA KOVILO:

P. 1 Danco

P. 4 Popola novjara pentraĵo



## Enhavo

|   |    |
|---|----|
| Al la legantoj . . . . .  | 2  |
| Aspekto de havenoj . . . . .  | 4  |
| Riĉa rikolto de montproduktaĵoj . . . . .                                   | 8  |
| Nova progreso de sciencoj kaj teknikoj de Ĉinio . . . . .                   | 10 |
| La idealo kaj realo de Esperanto . . . . .                                  | 13 |
| Sukcesa turneo . . . . .  | 15 |
| Intervjuo kun Fraŭrino Spomenka . . . . .                                   | 18 |
| Ĝoja renkontiĝo de fratinoj en Pekino . . . . .                             | 19 |
| Kanto al la ĉinaj patrinoj . . . . .  | 23 |
| Ekstraklasa instruistino Fang Bihuj . . . . .                               | 26 |
| Novaj floroj de la ĉina literaturo . . . . .                                | 28 |
| AMIKECO: Kunveno de scienco kaj amikeco . . . . .                           | 32 |
| En la Geknaba Domo de Ŝanhajo . . . . .                                     | 34 |
| EN PEKINO: La monto Badaling . . . . .                                      | 36 |
| EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La imperiestriĝa<br>sonĝo de Juan Ŝikaj . . . . . | 39 |
| KALEJDOSKOPO:   |    |
| Antikva liĉiarbo . . . . .  | 41 |
| Rara animalo — krokodila lacerto . . . . .                                  | 41 |
| KURANTAJ AFEROJ . . . . .   | 42 |
| INTER NI: Post reveno al Japanio . . . . .                                  | 43 |

# *Al la legantoj*

Karaj legantoj:

Je la komenco de la nova jaro ni deziras al vi ĝojon kaj feliĉon!

Kurantjare en Ĉinio estos kelkaj gravaj memoringaj aferoj, ekz. la 30-a datreveno de la fondiĝo de la nova Ĉinio, la 40-a datreveno de la skribo de Prezidanto Maŭ Zedong pri Esperanto k.a., pri kiuj raportos nia gazeto.

Ĉi tie ni volas fari simplan retrorigardon al la vojo irita de la ĉina popolo. Antaŭ tridek jaroj, t.e. en la jaro 1949, la brila lumo el la oriento de la mondo disradiis super vasta tero, kaj naskiĝis la Ĉina Popola Respubliko.

La venko de la ĉina popolo estas malfacile akirita, kaj por ĝi sennombraj revoluciuloj martiriĝis. Post sanga batalado de pli ol cent jaroj, nia popolo fine venkis sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de kamaradoj Maŭ Zedong, Ĝoŭ Enlaj kaj Ĝu De. Tio estas nur la unua paŝo de la longa marŝo, ĉar la agresado kaj prirabado de imperiistoj, la ekspluatado kaj subpremado de burokratoj, bienuloj kaj kompradoroj ĵetis la popolon en mizeran abismon, kaj ni devis komenci penan konstruadon. Ankoraŭ pli longa estas la vojo por disvolvo de la ekonomio kaj konstruado de la lando.

Dum la tridek jaroj, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio la ĉina popolo ŝanĝis la posedsistemon, batalis kontraŭ kaŝaj kaj malkaŝaj malamikoj, kaj samtempe faris grandskalan konstruadon, tiel ke la ĉina vasta tero surmetis sur sin novan veston.

La granda kultura revolucio forigis ĝenadon de Liu Ŝaŭki kaj subfosadon de Lin Biaŭ kaj la

“kvarpersona bando”, kiuj faris ĉiajn malbonaĵojn al la popolo, provis renversi la ŝtaton de la proleta diktaturo kaj multe damaĝis nian landon.

Ĝuste kiam nigraj nuboj ruliĝadis super Ĉinio, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de Hua Guofeng frakasis la “kvarpersonan bandon” en oktobro de 1976, tiel ke Ĉinio estis elsavita. Post tio okazis movado por malkaŝi kaj kritiki la nomitan bandon, komenĉiĝis ordigo de la lando, por ke la situacio de Ĉinio unuapaŝe pliboniĝu en unu jaro kaj multe pliboniĝu en tri jaroj. En la jaro 1977 okazis la 11-a Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la IV-a Tutlanda Popola Kongreso, kiu elmetis grandiozan celadon konstrui Ĉinion en potencon kun la modernaj industrio, agrikulturo, naciodefendo kaj scienco kaj tekniko en la fino de la dudeka jarcento. Ĉinio komencis la novan longan marŝon.

Dum la dujara landordigo la popolo klopodis por likvidi la malbonan influon de Lin Biaŭ kaj la “kvarpersona bando” en politiko, ekonomio, kulturo, arto, scienco, eduko, industrio, agrikulturo, popola vivo kaj aliaj flankoj de Ĉinio, kaj aperis nova fizionomio. Nun oni cerbumas, kiel pli multe fari kontribuon por efektiviĝi la kvar modernigojn kaj kiel rapidigi siajn paŝojn sur la vojo de la nova longa marŝo.

La kuranta jaro estas aparte memorinda por ni ĉinaj esperantistoj. En 1939 Prezidanto Maŭ skribis jenajn vortojn por la Jan-an-aj esperantistoj en norda Ŝenhi: “Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucionan, do Esperanto povas esti lernata

kaj devas esti lernata." De tiam forpasis jam kvardek jaroj. La ĉinaj esperantistoj ĉiam uzas Esperanton por raporti al niaj amikoj de diversaj landoj pri la revolucio kaj konstruado de Ĉinio kaj plifortigi interkompreniĝon kaj amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj. La fakto pruvis, ke Esperanto estas lingvo vivohava.

Ja signifoplena estas nia laboro. En la kuran-ta jaro, ni raportos al legantoj ankaŭ pri atingoj de la konstruado en la tridek jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ekzemple, kiel Ĉinio unuapaŝe konstruis sian fervojan reton, kiel la vojkonstruantoj sentime venkis malfacilojn por ŝanĝi la staton de malfacila trafiko kaj kiel vagonaroj serpentas sur altaj montoj kaj galopas sur dezertoj; kiel oni kondukas norden akvon de Jangzi-rivero por irigacii la grandan ebenaĵon de Hebej, Ŝandong, Henan kaj Anhuj kaj ŝanĝi la staton de sekeco en nordo kaj inundo en sudo de Ĉinio.

Nia revuo prezentos al niaj legantoj la ŝanĝiĝon de Ŝanhajo, la unua granda urbo de Ĉinio, kaj Siĉuan-provinco kun ĉ. cent milionoj da loĝantoj, kiuj pasinte suferis gravan detruon de la "kvarpersona bando" kaj nun rapide restariĝas.

Kaj ni raportos ankaŭ pri virinoj, eduka reformo, disvolviĝo de Tibeto kaj aliaj regionoj

de nacimalplimultoj, la popola vivo, amuzo, amo, geedziĝo kaj aliaj flankoj, kaj krome ankaŭ pri la belaj ĝardeno kaj palaco en Ĉengde konstruita en King-dinastio.

Ni plimultigos raporton pri esperantaj aktivaĵoj ekzemple pri Verda Majo, la japana esperantistino-verkistino en Ĉinio, pri la Ĉina Pupteatra Trupo en la 11-a Pupteatra Internacia Festivalo en Jugoslavio kaj pri intervidiĝo de raportistoj de la redakcio kun jugoslavaj esperantistoj ktp.

Ni plimultigos pejzaĝajn fotojn kaj bone adaptos bildojn kaj ilustraĵojn al gravaj artikoloj.

Estas konfesende, ke en la pasintaj dek jaroj nia revuo estis ne tiel bone redaktita pro influo de formalismo, kaj mankis al ĝi raportoj pri Esperanto. Post frakaso de la "kvarpersona bando" liberiĝis niaj pensoj. En la lastaj du jaroj nia revuo estis iom plibonigita. Kompreneble tio estas ne apartigebla de kuraĝigo kaj helpo de niaj legantoj kaj pro tio ni esprimas dankon al ili! Tamen la plibonigo ankoraŭ estas ne sufiĉa kaj ni devas klopodi plu. Ni kore esperas, ke niaj legantoj pli varme helpos nin por kune plibonigi EPC.

## LA REDAKCIO

### Korespondi Deziras

Ni prezentos al vi korespondantojn de Japanio. Skribu al ni preslitere viajn aĝon, sekson, profesion, hobion kaj adreson espereble kun foto.

Japania Esperanto Instituto  
Waseda-mati 12-3,  
Sinzyuku-ku, Tokio 162,  
Japanio

\* \* \*

\* Lavriša Milan, 18-j., laboristo, C.na. Bro 8, 61000 Ljubljana, Jugoslavio, pri vojaĝo, sporto, ktp.,

kolektas insignojn kaj bildpoŝtkartojn

\* John Wood, 27-j., statistikisto, flat 7,7 Clipstone St, London W1, Britio, kun ĉinaj esp-istoj, pri kulturo, ktp.


\* Esperanta grupo en urbo Nejaĝaŭa, pere de s-ro Soičiro Jano, 17-13 Mijuki-niŝi-maĉj, Nejaĝaŭa-ŝi, Oosaka 572, japanio, kun ĉinaj esp-istoj.

\* Karl Sautter, poŝtovicisto, 39-j., Neuffener Str. 19, 741 Hulben, FRG, kun ĉina esperantisto kun sama profesio.

\* Eugeniusz Gorny, Raino Doine 13, 57-411 Wamblerzyce, Pollando, kun ĉinaj esp-istoj.

\* Tom Prince, 6183 Overdale Ave., Oakland, CA, Usono 94605, kun ĉina esp-isto.

### LA SOLVO DE LA LUDO EN NUMERO 12, 1978



# Aspektó de havenoj



de **TIANŜEN** kaj **HIAŬJUN**

Veturante malsupren en Jangzi-rivero, la ŝipoj devas en- kaj ellasi pasaĝerojn ĉe multaj trapasataj havenoj. Kaj ĉiufoje, kiam nia ŝipo ankris ĉe kajo, ni aŭ surbordiĝis por iom promeni aŭ rigardis la ĉirkaŭaĵon de la haveno starante sur ferdeko.

Iu laboranto de la Havena Sekcio de la Trafika Administracio de Jangzi-rivero diris al ni: “Nun troviĝas jam 24 havenoj sur la naviga linio de Jangzi-rivero. La malnovaj havenoj Ŝanhajo, Nankino, Vuhan k. a. estas rekonstruataj kaj samtempe kun tio novaj havenoj estas konstruataj ĉe Ĝiceng, Jangluo, Ĉenglinggi k.a. Petrola tublinio interliganta la petrolkampon en Ŝandong-provinco kun la haveno Nankino en la malsupra baseno de la rivero estas jam konstruita. Funkcias en haveno pontgruoj kaj karbovagona renversilo...” Hodiaŭ, rimarkeble plimultiĝis la procentoj de industriaj materialoj en la totala kvanto de transportataj varoj sur la

linio de Jangzi-rivero, kaj pli ol 69% de la transportitaj varoj de ĝiaj havenoj estas petrolo, karbo kaj erco.

Dum la vojaĝo ni vidis, ke iuj havenoj uzas ĉerpmaŝinojn kaj elevatorojn. En malŝarĝo de erco laboristoj metis retegon sur la fundo de ĉiu holdo, kaj kiam plejparto de la erco en ili estis elprenita per ĉerpmaŝino, oni povis levi la reton kun la restaĵo. Iuj havenoj kvarobligis sian transportadon de cemento, dank’ al apliko de nova metodo, nome movi cementsakojn kontenere. En la lastaj jaroj, kontenera metodo estas aplikata en transporto de ĉiutagaj bezonaĵoj. Post frakaso de la “kvarpersona bando”, la kreivo de la laboristoj estas bone disvolvita. Kaj pro tiu pozitiva faktoro, la totala kvanto de la transportitaj varoj de la havenoj de Jangzi-rivero de 1977 estis je 19 procentoj pli granda ol tiu de 1976, kaj tiu de la 10 unuaj monatoj de 1978 estis je 35 procentoj pli granda ol tiu de la

sama periodo de 1977. Tio montras, ke la riveraj havenoj de nia lando eniris novan periodon de impetado.

Ni vizitis la havenojn Ĉongking, Giugiang kaj Nantong kaj vidis ĉe ili diversgradan progreson en havena konstruado.

## PRINTEMPO DE MALNOVAJ HAVENOJ

La haveno Ĉongking ĉe la kunfluejo de Jangzi-rivero kaj Gialing-rivero havas 14 fiksjajn kajojn. La fervojoj de Ĉengdu, Hiangfan, Ŝanhajo kaj Pekino al Ĉongking interligiĝas ĉe ĝi kun Jangzi-rivero, kaj Gialing-rivero interligas tiun urbon kun la Baŭgi-Ĉengdu-a Fervojo kaj la Siĉuan-Ŝenhi-a kaj Siĉuan-Gansu-a Ŝoseoj. En la sekvanta tago post nia alveno al Ĉongking, ni vizitis la laborsekcion de Giulongpo, kies kvanto de transportataj varoj konsistigas 60% de la totala kvanto de la tuta haveno Ĉongking. Sur la kajo kun longeco de 1 kilometro, rapidas trajno plensarĝita per ŝtalaj materialoj; sur la vasta varplaco, kuŝas bonorde granda kvanto de konstruaj materialoj; en la direktejoj de la ŝarĝatoroj, laboristoj manipulas atenteme.

Vicdirektoro de la laborsekcio diris, ke forpasis por ĉiam la tempo, en kiu portistoj devis trairi pastabulon ŝanceliĝante kun peza ŝarĝo sur la ŝultro. En la jaro 1958, kiam okazis la granda antaŭensalto de socialisma konstruado, 6 novaj kajoj meĥanizitaj konstruiĝis ĉe Giulongpo. Poste, oni konstruis sur la kajo n-ro 5 mekanikan ŝarĝlinion por fosfora mineralo kaj per tio multe plibonigis la laborkondiĉojn.

Tiu vicdirektoro estis transpostenigita al tiu loko antaŭ 20 jaroj. Li estas teknikisto fervora en teknika renovigo de la haveno. Antaŭnelonge, li kaj liaj kolegoj renovigis la grupojn kaj per tio duobligis laborefikecon. Kaj ni pririgardis kun ĝojo alian plibonigitan gigantan ŝarĝmaŝinon, kies "mano" povas rapide transmeti fosforajn minaĵojn el vagonoj sur elevatoron.

Ni informiĝis ankaŭ, ke en la laborsekcio de Giangbej, tre dezerta en la pasinteco, konstruiĝis 4 novaj kajoj kun 4 novaj ankrejoj, kaj ankaŭ ĉe la malproksimaj Langiatuo kaj Maŭertuo konstruiĝis ŝarĝejoj relative alte meĥanizitaj. La

totala kvanto de la transportitaj varoj de la tuta haveno en la unua duono de 1978 kreskis je 32% kompare kun tiu de la sama periodo de 1977, kaj la meznombra ankrada tempo mallongiĝis je duono kompare kun tiu antaŭ 4 jaroj. En ĉiu tago, granda kvanto da agrikulturaj produktaĵoj, ŝtalaĵoj kaj kemisterkoj produktitaj en Siĉuan-provinco estas elportataj tra Ĉongking-haveno, kaj ankaŭ multaj novaj industriaj ekipaĵoj estas enportataj al Siĉuan kaj aliaj lokoj en sudokcidenta Ĉinio tra tiu haveno.


Proksime de la domo de la Ĉongking-havena Administracio sin trovas la kajo Ĉaŭtianmen, kies centoj da ŝtupoj estas atestanto pri la ekspluatado de en- kaj eksterlandaj reakciuloj al ĉinaj laboristoj en la pasinteco. Antaŭ 80 jaroj, King-dinastio subskribis kun fremdaj agresantoj kontrakton kiu atencis la ĉinan suverenecon kaj malhonoris la nacion, kaj Ĉongking fariĝis komerca havenurbo por fremduloj. Tiam kulioj laborantaj sur la kajo devis trapasi pastabulojn kun peza ŝarĝo sur la kurbigita dorso kaj ofte falis kaj dronis en akvo.

Hodiaŭ, ĉe la kajo Ĉaŭtianmen jam funkcias elektraj kablovagonoj. La nova pasaĝera domo povas akcepti ĉiujare pli ol du milionojn da pasaĝeroj. Ni promenis sur la asfalta strato kaj en la bela surstrata parko. Aparta ŝoseo rekte kondukas al la pramejo. Kie antaŭe estis malpura strateto, nun estas avenuo kun verdaj ombroj de kamforarboj kaj nerioj, ĉe kies flankoj staras restoracioj laboristaj loĝdomoj kaj marista klubejo. Ascendinte la plej supran etaĝon de iu domo, ni vidis ke flosaj grupoj estas vigle laborantaj ĉe la kajo.

## VORTOJ DE DOKISTOJ

"En la malnova socio, ni estis subpremataj en la plej malaltan socitavolon, ŝirmis nian korpon per jutsako anstataŭ vestoj, tranoktis en kadukaj temploj kaj ne havis la monon por edziĝi. Sed nun ni jam havas feliĉan familion kaj vivas ĉiam pli bone." Tion diris emerita dokisto Caŭ Jubaŭ al ni en sia domo en la Nova Laborista Vilaĝo de Giugiang-haveno.

La nomita vilaĝo estas unu el la kvar laboristaj loĝkvartaloj de Giugiang kaj havas tota-



*Sakoŝarĝa maŝino provfarita de ŝanhajaj havenlaboristoj*


lan plankareon de pli ol 13,000 kvadrataj metroj. Ĉiutage, specialaj aŭtobusoj de la havena administracio portas laboristojn al laborejo kaj hejmen en regulaj horoj. Vespere, la laboristoj aŭ rigardas televidajn programerojn aŭ lernas teknikon aŭ vizitas teatrojn.

Caŭ Jubaŭ estas nun 65-jara. Li diris al ni, ke en la malnova socio, la dokistoj ĉiutage suferis de malsato kaj tamen devis portadi kiel ĉevaloj pezegan ŝarĝon, dum multaj specoj de impostoj ilin sufokadis. "Post kiam la popolo kaptis la ŝtatan gvidantecon," li diris, "nia vivo

pliboniĝas kvazaŭ velkantaj arboj reprospiriĝas en printempo." En la havena distrikto kun 17 novaj kaj plivastigitaj kajoj, aldoniĝis multaj instalaĵoj por oportunigi la vivon de la laboristoj. Fondiĝis lernejoj, infanĝardenoj kaj la laboristoj (inkluzive emeritiĝintajn) nun ricevas senpagan kuracon. Kaj krome, la havena administracio sendos de tempo al tempo laboristojn al sanatorioj en pitoreskaj Luŝan, Donghu kaj Bejdajhe por ke ili tie ripozu aŭ ricevu kuracadon. 40 procentoj de la mezgradaj kadroj de tiu administracio devenis de laboristoj, kaj ili ludas gravan rolon en administrado de staplejoj kun totala plankareo de pli ol 42,000 kvadrataj metroj kaj diversaj maŝinoj.

La urbo Giugiang troviĝas sur la suda bordo de Jangzi-rivero ĉe la norda piedo de la alta Luŝan-monto. Legendo diras, ke en antikveco tie kunfluis 9 riveroj kaj pro tio ĝi ricevis sian nomon Giugiang signifantan "Naŭ Riveroj". Ekde la Opia Milito en la jaro 1840 ĝis la falo de la regantaro de Ĉiang Kajŝek, tiu grava havenurbo estis okupata de imperiistoj. Ili ne nur freneze forrabis niajn riĉaĵojn, sed ankaŭ faris religian kaj kulturen enpenetradon. Hodiaŭ, dank' al konstruado de la popolo, ĝi jam fariĝis nova industria urbo en la meza baseno de Jangzi-rivero kaj havas ĉirkaŭ 100 fabrikojn de tekstilado, maŝinfarado, metalurgio, elektro kaj ŝipfarado.

*Ĉongking-haveno*





Iutage, ni venis al la kajo n-ro 3. Tie troviĝas historia loko de antikva Bivo-kiosko, kie la fama poeto de Tang-dinastio Baj Gjuji skribis siajn malgajajn versojn pri bivoludo de forlasita virino en boato. Starante sur alta loko ni vidis, ke veturas ŝipoj plensarĝitaj en la rivero kaj maljuna Caŭ, kiu akompanis nin, diris emocie, ke Giugiang ŝanĝiĝis kaj la malnova socio forpasis senrevene kiel la torento de la rivero.

### NANTONG-HAVENO, PASEJO SUR LA EBENAĴO DE GIANGSU

Ni venis al la urbo Nantong en la malsupra baseno de Jangzi-rivero. Tiu urbo estas konata kiel "tekstila urbo" pro sia prospera tekstila industrio. Ĝi kovras areon de 14 kvadrataj kilometroj kaj havas iom malpli ol 170,000 loĝantojn. En la urbo troviĝas multaj riveroj interkruĉantaj kaj kotono produktita en la ĉirkaŭaĵo estas alportita al ĝi ĝenerale per ŝipoj. Nantong havas 4 grandajn cementajn kajojn etendiĝantajn en Jangzi-riveron. Ĉirkaŭ la urbo staras unu apud alia kvin montoj, kiuj formas belajn pejzaĝojn.

90 procentoj de la kotono produktita de tiu fama kotoncentro estas liverataj al aliaj provincoj kaj fremdaj landoj, tial tie estas tre intensa la trafikado sur la riverego. Nun la ŝarĝado kaj malŝarĝado en Nantong-haveno jam estas fundamente meĥanizitaj. 5,000-tonelaj ŝipoj povas ankri rekte ĉe la kajoj kaj ĉiujare pli ol


2,500,000 tunoj da varoj (t.e. ĉ. 30-oblo de tiu en la komenca periodo tuj post la Liberiĝo) estas transportitaj tra tiu haveno. Kaj la nombro de ĝiaj pasaĝersipaj kursoj multiĝis de unu ĝis kvar.

Por kontentigi la bezonon de la disvolviĝanta eksterlanda komerco, nun oni tie konstruas modernan havenon, kiu ebligas facilan ŝarĝadon al oceanaj ŝipoj. Tiu haveno prenos al si parton de la transporta tasko de Ŝanhajo-haveno kaj servos kiel etendaĵo de la kajoj de Ŝanhajo.

En la kvardekaj jaroj, Nantong estis nur provizora ankrejo por ŝanhajaj pasaĝeraj ŝipoj. Tiam la pasaĝeroj devis surbordiĝi kaj enŝipiĝi per boatoj. Ekde 1958, miloj da homoj komencis konstrui novan havenon interligantan la maran, teran kaj riveran trafikadon sur la dezerta bordo kaj dank' al ĝia finkonstruo en tri jaroj, Nantong turniĝis en gravan pasejon en norda Giangsu.

Promenante ĉe la haveno, ni vidis ĝian helan pasaĝeran atendejon kiu havas lokon por 2,000 personoj, belajn hotelon kaj magazemon. Sur ĝia placo troviĝas kamionoj kaj aŭtobusoj por longaj kaj mallongaj kursoj.

Same kiel la havenoj Giugiang kaj Ĉongking, ankaŭ Nantong-haveno vige prosperas, kvankam ankoraŭ ne tre modernigita, tamen ĝia fizionomio estas senĉese ŝanĝiĝanta dank' al brila laborado de la konstruantoj, kaj baldaŭ alvenos tajdo de moderniga konstruado.



# *Riĉa rikolto de montproduktaĵoj*

**A**ŬTUNO estas sezono de rikoltado kaj ankaŭ estas tempo por kolekti sovaĝajn montproduktaĵojn.

En iu serena kaj agrabla tago de oktobro, ni veturis norden de la gubernia urbo Pingkjuan, trapasis 35 kilometrojn sur serpenta montvojo kaj atingis Kigia-komunumon. Tie estas profunda montaro kun antikvaj arboj ĉielskrapantaj kaj frosta klimato.

“Sur la montaro ĉie troviĝas valoraj kreskaĵoj kaj sovaĝaj bestoj,” ofte diras komunumanoj de Kigia. Iliaj vortoj ja estas veraj. Tie produktiĝas amandoj, arbosemoj, fungoj, drogherboj, glanoj, aveloj, leporoj kaj aliaj kelkdek specoj de arboj kaj bestoj. En ĉiuj sezonoj oni povas rikolti

sovaĝajn vegetaĵojn kaj ĉasi bestojn, sed oktobro estas la plej abunda sezono. La aĉeta stacio de la komunumo estas plena de homoj: por vendi diversajn montproduktaĵojn venis tien geknaboj kunportantaj korbojn, maljunuloj kun sako sur la dorso kaj junuloj puŝantaj ĉarojn. En la korto de la stacio amandoj amasiĝas kiel monto, drogherboj estas sunumataj, staras multaj korboj plenaj de fungoj, multaj pecoj da feloj pendas sur la muro. . . Kamionoj plene ŝarĝitaj je montproduktaĵoj kuras sur la vojo al la gubernia urbo.

Respondeculo de la stacio diris ĝoje: En 1978 riĉa rikolto de montaj kaj lokaj produktaĵoj estis ricevita. En la mezo de septembro, ili jam plenumis antaŭdate je 100 tagoj la tutjaran aĉetan




*Kolektado de sovaĝaj abrikotoj*

taskon de 360,000 juanoj. Laŭ antaŭkalkulo, ĝis la fino de la lasta jaro, la aĉeta valoro povis atingi 500,000 juanojn, kaj ĉiu persono de la komunumo povis enspezi meznombre 50 juanojn. Li rimarkigis, ke efektivigo de kampara ekonomia politiko portas al la merkato prosperecon. En la pasinteco la "kvarpersona bando" subfosis la nacian ekonomion kaj kaŭzis haoson al la pensoj de la popolanoj, kaj kamparaj kadroj ne kuraĝis disvolvi flankokupojn. Se iu sendis komunumanojn kolekti montproduktaĵojn, tiu estis kulpigita per "zorgo nur pri flankokupoj kaj neglekto pri agrikulturo" kaj per "iro de kapitalisma vojo antagonisma al la ĉefa tasko". Tio kaŭzis perdon de granda kvanto da montproduktaĵoj al la ŝtato kaj malmultigis al komunumanoj enspezon. Kvankam la komunumo vizaĝis al la trezora monto, tamen ĝi devis pruntepreni monon de la ŝtato. Post la frakaso de la "kvarpersona bando", efektivigante la principon "disvolu plenampleksan entreprenadon kun greno kiel ĉefĉenero", la partia komitato de la komunumo organizis komunumanojn por bone rikolti ne nur grenon sed ankaŭ montproduktaĵojn en aŭtuno.

En la lastaj du jaroj, Kigia-komunumo aĉetis 15 traktorojn per la enspezo el vendo de la montproduktaĵoj kaj aliaj flankokupaj produktaĵoj. Tio rapidigas la paŝon de agrikultura meĥanizado. Dank' al uzo de maŝinoj kaj alpreno de aliaj helprimedoj, agrikulturo ricevis riĉajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj. En antaŭaj jaroj, la komunumo ne havis sufiĉan grenon por sia bezono kaj bezonis liveron de komerca greno de la ŝtato. En 1977, ĝi ne nur vendis 350 tunojn da greno al la ŝtato, sed ankaŭ tenis 250 tunojn da greno en rezervo. En la jaro 1978 oni gajnis alian riĉan rikolton.

Utiligante la ŝancon ni vizitis du familiojn de la 8-a taĉmento de Kigia-brigado proksime de la komunuma oficejo. La familio de ĉarpentisto Lin Zejoŭ konsistas el kvar membroj kaj loĝas en brika domo kun kvar ĉambroj, en kiuj troviĝas tablohorloĝo, kudromaŝino, biciklo kaj radio-ricevilo. Krome ili havas superbezonan grenon kaj deponitan monon en banko. En la korto estas sunumataj pli ol 15 kilogramoj da pinose-



*Lavado de ginsengoj*

moj. Komunumano Vang Ĝenping diris, ke lia familio enspezis pli ol 200 juanojn per vendo de arbosemoj, drogherboj kaj pli ol 50 kilogramoj da fungoj. Iuj familioj enspezis 300-400 juanojn per montproduktaĵoj. Nun, la kolektiva deponita monsumo de la komunumo atingis 260,000 juanojn kaj tiu de privataj komunumanoj pli ol 90,000 juanojn.

La komunumo estas miniaturo de la tuta gubernio. Pingkjuan-gubernio situas en Janŝan-montaro norde de la Granda Muro. Tie abundas montproduktaĵoj, ekz., amandoj, jujubkernoj, skutelario kaj aliaj, kiuj ĝuas tre bonan reputacion en internacia merkato. Nun ĉie prezentiĝas prospera fizionomio. Ĝis la mezo de oktobro de la pasinta jaro la tuta gubernio aĉetis 570 tunojn da amandoj, t.e. 100% pli multe ol la planita kvanto, 1250 tunojn da fungoj, je 80% pli multe kompare kun la kvanto de la plej altprodukta jaro de la historio. La rikoltaj kvantoj de ginsengoj (*Panax ginseng*), cervaj junkornoj, mielo, astragalo, tangŝeno (*Codonopsis pilosula*), skutelario, kerno de jujubo, raraj drogherboj kaj aliaj lokaj produktaĵoj ricevis relative grandan plimultiĝon kompare kun tiuj de la pasintaj jaroj. La totala enspezo de la tuta gubernio per montproduktaĵoj plimultiĝis je ĉ. 30% kompare kun tiu de la sama periodo de la jaro 1977.

# Nova progreso de sciencoj kaj teknikoj de Ĉinio

“**M**ARŜU al modernigode sciencoj kaj teknikoj”, tiu ĉi slogano estas realigata de la sciencistoj kaj teknikistoj kaj la vastaj popolamasoj de Ĉinio. Ili estas plenumantaj la Okjaran Planon por disvolvo de Sciencoj kaj Teknikoj 1978-1985, ellaboritan de la Tutlanda Scienca Konferenco okazigita en marto de la lasta jaro.

En Hefej, ĉefurbo de la provinco Anhuĵ de orienta Ĉinio, estas konstruata regata termonuklea fuzia instalaĵo. En Lanĝoŭ, ĉefurbo de la provinco Gansu de nordokcidenta Ĉinio, estas konstruata diametre ses-metra separata sektora grandjona ciklotrono. Oni sin okupas pri esplorado kaj provfarado de grandtipaj komputeroj. Sur Junnan-altebenajo estas konstruata astronomia observa bazloko kun monda avangarda nivelo. Sur la Tibeta Altebenajo konata kiel



“monda firsto” oni konstruas fizikan esplorojn de kosmaj radioj. Kaj tergloba sinkrosputniko estas en intensa esplorado kaj provfarado.

Tiuj ĉi konstruaĵoj supre menciitaj estas nur parto de la 108 gravaj sciencexploraj objektoj kiujn Ĉinio plenumos en la venontaj ok jaroj. La realigo de tiu okjara plano metas solidan bazon al la ĉinaj sciencoj kaj teknikoj por kuratingo kaj supero de la avangarda nivelo de la mondo.

En diversaj lokoj de Ĉinio, la sciencaj kaj teknikaj laborantoj kaj la vastaj popolamasoj disvolvas multifakajn sciencajn esploradojn en socialisma kunlaboro, por gajni maksimuman sukceson en mallonga tempo.

En nia lando formiĝis sciencexplora reto pri kriza superkonduko de alta temperaturo. La reto

*Fame konata fizikisto Ĝang Venĵu (dekstre) aktive sin okupas, kune kun aliaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj, pri konstruado de la unua altenergia fizika eksperimenta centro.*



konsistas el dekoj da sciencsplora unuoj kaj altlernejoj. Ili kunlabore gajnis gravajn sukcesojn en studado de bazaj teorioj, esplora eksperimentado, esplorado kaj provfarado de materialoj, instrumentoj k. a. Por liveri al la elektrona industrio altkvalitan silician monokristalon, diverslokaj sciencistoj establis kunlaboran grupon por studi la bazan teorion pri mankoj de silicia monokristalo. Formiĝis en nia lando ankaŭ esplora centro pri jonoenmetado kun la Pekina Normala Universitato kiel ĝia ĉefa membro. Fizikistoj, matematikistoj kaj ĥemiistoj laboras en la centro kaj jam trovis pli ol dudek fontojn de jonoj kaj faris profundan teorian studadon.


La afero de sciencoj kaj teknikoj de Ĉinio, kiu suferis frenezan tretadon de la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando", estas en restarigo kaj reordigo. La Ĉina Akademio de Sciencoj, kiu posedis 72 institutojn, nun restarigis siajn naŭ filiajn akademiojn en Ŝanhajo, Hefej, Vuhan, Ĉengdu, Langŝou, Hingiang, Ŝenjang, Ĉangĉun kaj Kantono. En diversaj lokoj de nia lando, miloj da malorganizitaj sciencsploraj institutoj denove funkcias, kaj aro da novaj institutoj establiĝis. Dekmiloj da sciencaj-teknikaj laborantoj revenis al sciencsploraj

postenoj. Estas iom post iom plenigitaj iuj vakuaj fakoj, kiaj tiuj de surfaca fiziko kaj amorfa fiziko, kaj ankaŭ iuj kampoj de praktika matematiko, tekniko de grandskalaj integraj cirkvitoj kaj aliaj.


Sciencistoj de Fudan-universitato en Ŝanhajo plenumis en mallonga tempo observadon pri aperaj potencialaj spektroj, kaj uzante X-radian fotoelektronan spektron kaj dorse disigita teknikon ili analizis la dislokiĝon de kloro en silicia dioksido. Sciencistoj de dekoj da sciencsploraj unuoj kaj altaj lernejoj en kunlaborado faris ĉiuf flankan esploron de teorio kaj eksperimento al dinamikeco, elektreco, magnetismo kaj superkondukeco de la amorfa stato. Ili jam elmetis la eblan vojon por gajni grandpecan amorfan materialon.

Energie disvolvante esploron pri praktikaj sciencoj, sciencistoj de diversaj fakoj ankaŭ plifortigas studadon de bazaj teorioj. La studado pri bazaj teorioj de naturaj sciencoj, inkluzive de moderna matematiko, altenergia fiziko kaj molekula biologio, estas metita sur elstaran lokon. La nukleofizikistoj de Ĉinio donis apartan atenton al kombino de la esplora laboro de

*Hidrogenatoma horloĝo sukcese farita en Ŝanhajo*



*Sciencaj kaj teknikaj laborantoj de la Sudokcidenta Fizika Instituto muntas gaspumpilaron de etipa "cirkulatoro".*



fizika modelo kaj teoria metodo kun la kvanta kalkulado. Tio impulsas la studadon pri bazaj teorioj al profunda disvolviĝo.


Post la Tutlanda Scienca Konferenco, diversaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kunvokis respektive sian sciencon konferencon aŭ kunvenon de scienca laboro por efektiviĝi la Tutlandan Okjaran Planon por Disvolvo de Sciencoj kaj Teknikoj kaj ellabori kaj revizii sian propran planon laŭ lokaj konkretaj kondiĉoj. La diversaj lokoj ankaŭ reordigis kaj plifortigis la gvidantaron de sciencesploraj institutoj, metante eminentajn sciencesplorajn laborantojn sur gvidajn postenojn; promociis sciencesplorajn laborantojn kiuj akiris multajn sukcesojn, kaj laŭdis kaj premiis ilin pro iliaj sukcesoj en scienca esplorado, kaj vaste disvolvis sciencajn interŝanĝojn.

Dank' al tiuj ĉi planoj kaj rimedoj multe leviĝis aktiveco de la sciencistoj kaj teknikistoj kaj popolamasoj en scienca esplorado. En 1978 ili gajnis sufiĉe elstarajn fruktojn ĉu kvante ĉu kvalite. Kaj iuj objektoj atingis avangardan nivelon de la mondo.


Liaŭning-universitato kaj la Jingkoŭ-a Elektronika Instituto kune esploris kaj elfaris kvar

specojn de grandskalaj integraj cirkvitoj kaj dek specojn de mezaj, kaj sukcese muntis unuan multpovan tablan komputeron de nia lando. La Ĉina Scienca-Teknika Universitato esploris kaj sukcese provfaris signo-montran fino-ekipajon JZK-800. La Ĉangŝa-a Politekniko kaj la Hunan-a Radiofabriko kune studis kaj sukcese fabrikis indikilon de koloraj figuroj de komputeroj. Tiuj ĉi atingoj ludas gravan rolon en efikoaltigo kaj popularigo de komputeroj. La Fera-ŝtala Instituto sub la Anŝan-a Fera-ŝtala Kompanio sukcese trovis novan teknologian proceson, tiel ke la proporcio de koncentriĝaj eroj altiĝis ĝis 67.8% kaj la reprenita proporcio de metaloj atingas 98.5%

Surbaze de sukcesoj en kulturado de hibrida rizo kaj polena monoploida selektado de dekelkaj gramenacaj vegetaĵoj, en la kuranta jaro, la ĉinaj agronomoj gajnis grandan progreson en kulturado de nova speco de maizo kiu karakteriĝas per malalta tigo, densa kreskado, frua maturiĝo kaj alta produktokvanto. Rilate al pina polena monoploida selektado kaj organiza kulturado, ili sukcese gajnis hibridajn plantidojn de mandarino, oranĝo, poplo kaj saliko, kaj progresas en studado de teorio pri antera kulturado.



*La Sanhaja Metalurgia Instituto trovis per jono-enmeta maŝino novan teknologion de dorse disiĝa mezurado por analizi supraĵojn de transistoro.*



La aŭtoro

## I

La Genezo diras en sia dekunua ĉapitro, ke la homaro havis komence unuecan lingvon. Ĝi konstruis urbon kaj turon por sin famigi. Pro envio la Eternulo konfuzis la lingvon kaj sekve la homoj sukcesis finkonstrui nek la urbon nek la turon kaj disgrupiĝis. Kaŭze de lingva diverseco estiĝis poste suspektado kaj malamo, iam eĉ reciprokaj mortigoj, inter la nacioj.

Tio estas nur religia legendo. Sed tamen tiel estis en Polujo sub la cara regado dum la fino de la 19-a jarcento. Vidante tion, doktoro de Polujo Zamenhof ĉagreniĝis, kaj decidis krei internacian lingvon, esperante, ke ĉiuj nacioj, ĉiuj homoj komprenos unu alian kaj kune eniros "rondon harmonian". Kaj en 1887 li publikigis sian Esperanton. Tamen li ne sciis, ke la malamikeco inter diversaj naciecoj en Polujo estas kaŭzita de la Caro, kaj des malpli, ke per la kreo li ribelas kontraŭ la Dio, kontraŭ la Caro.

# La idealo kaj realo de Esperanto

de CICIO MAR

Sed ĝuste pro tio lia lingvo rapide populariĝis. Kompreneble la Caro tion malpermesis, kaj tial la unua propagandilo «La Esperantisto» en 1889 devis eldoniĝi en Germanujo. La Caro malpermesis ĝian eniron, ĉar en ĝi aperis artikolo de L. Tolstoj. Sed la Caro restis senpova kontraŭ la disvolviĝado de Esperanto. En multaj landoj fondiĝis ligoj aŭ asocioj de Esperanto, sekve la Universala Esperanto-Asocio, kiu energie vastigas la Esperanto-movadon en la tuta mondo.

Esperanto estas simpla, logika kaj facila por ellernado. Zamenhof tradukis kun siaj samideanoj multon da mondfamaj literaturaj verkoj, kio servis kiel praktika bazo por Esperanto. Hodiaŭ multaj parolas, verkas kaj tradukas per Esperanto. Ĝi estas lingvo vivanta. En la monda literaturo emergis la literaturo de Esperanto. La novelo «Printempo en la Aŭtuno», tradukita de la fama verkisto Bakin en la ĉinan lingvon, estas originale verkita de hungara verkisto Julio Baghy per Esperanto.

Ĝojinde estas, ke multaj malgrandaj nacioj aŭdigadis sian voĉon al la mondo per Esperanto tradukante siajn elstarajn verkojn Esperanten kaj per tio rompis la blokadon kaj sufokadon kiujn faris la potencoj per siaj lingvoj.

Dum la tridekaj jaroj kaj post la Liberiĝo oni tradukis el Esperanto en la ĉinan lingvon literaturarojn de multaj orienteŭropaj landoj, ekz-e, poemojn de Petofi, novelojn de Ivan Vazov kaj Elin Pelin. En nia lando, en la tridekaj jaroj plenaj de mizero kaj bataloj, eldoniĝis novelaro «Forgesitaj Homoj» originale verkita en Esperanto kaj esperantigita novelaro «Nova Tasko» pri la Rezistmilito.

## II

Esperanto diskoniĝis en nia lando en la dudekaj jaroj. Ĉinaj esperantistoj elmetis en la tridekaj jaroj la devizon “Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio”, fondis la Ĉinan Proletan Esperantistan Union kaj aniĝis al la Internacio de Proleta Esperantistaro. Ili faris kontaktojn kun esperantistaj organizoj de Japanujo, Germanujo, Francujo, Hispanujo kaj tiam tre aktiva Sovetrespublikara Esperantista Unio. Tiuj internaciaj esperantistaj organizoj eldonis nemalmultajn marksismajn-leninismajn verkojn, librojn kaj gazetojn pri la revolucia batalado de la popoloj, el kiuj nemalmultaj legaĵoj estas tradukitaj en la ĉinan lingvon kaj publikigitaj en la gazeto «Monda Kulturo» redaktata de Kamarado Hujucz, kiu poste vizitis Sovetunion helpe de sovetuniaj esperantistoj kaj skribis la libron «Impresoj en Moskvo» kiu sufiĉe sisteme konigis Sovetunion. Cetere, la progresemaĵoj ĉinaj esperantistoj eldonis monatan gazeton «Ĉinan PEK-Bultenon» por raporti la starpunkton de la Komunista Partio de Ĉinio en la kontraŭjapana naciisava batalado, la situacion de la sovetaj regionoj en Ĉinio kaj de la Laborista-Kampana Ruĝa Armeo, la vivon kaj batalon de la ĉina popolo. Kaj diverslandaj esperantistoj tradukis tiujn novaĵojn en sian nacian lingvon kaj publikigis ilin en ĵurnaloj kaj gazetoj de sia lando.

Poste kun la Ĉina Proleta Esperantista Unio kiel kerno fondiĝis oficiala Esperanto-Ligo kaj

eldoniĝis periodaĵo «La Mondo» por informi alilandajn popolojn pri la naciliberiga batalo de la ĉina popolo. Pli poste aperis aliaj periodaĵoj, kiaj estas «Ĉinio Hurlas» kaj «Voĉoj el Oriento». Ili postlasis ege profundan impreson sur la popoloj de la mondo, precipe sur la malgrandaj popoloj, batalantaj same por libereco kaj sendependeco. Tiamaniere Esperanto fariĝis ponto inter la ĉina kaj alilandaj popoloj en la interŝanĝado de batalaj informoj. La 9-an de decembro, 1939, Prezidanto Maŭ Zedong skribis jenajn vortojn por la Esperanta Ekspozicio aranĝita de la esperantistoj en Jan-an:

Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucionan, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata.

Tio pliklarigis la direkton de la Esperantomovado en Ĉinio.

En la malnova Ĉinio regata de la kuomintanga reakciularo Esperanto estis sufokata kaj nemalmultaj esperantistoj estis ĵetitaj en karceron. La liberigita Ĉinio prezentis favorajn kondiĉojn al uzado kaj disvolvado de Esperanto. Fondiĝis la Ĉina Esperanto-Ligo, ekaperis «El Popola Ĉinio» kaj eldoniĝis granda kvanto da esperantaj libroj. Radio Pekino dissendas ankaŭ Esp-e. La reforma movado de la ĉinaj ideografiaĵoj disvolviĝas surbaze de la latiniga movado kiun disvastigis la progresemaĵoj esperantistoj en la tridekaj jaroj kaj de la pliposta popollingva movado.

## III

La 63-a UK okazinta en Bulgario estas la dua laŭ la multeco de la ĉeestantoj. UEA elmetis siajn opiniojn pri la internacia Esperantomovado, ekz-e, oponi al la lingva diskriminacio, energie popularigi Esperanton en la tria mondo, multe eldoni sciencoteknikajn kaj kulturajn legaĵojn en Esperanto, efike servigi Esp-ton al la popoloj de la tria mondo por ke ili akiru sciojn, plivastigi sciencajn interŝanĝojn inter natursciencistoj kaj inter humanistoj pere de Esperanto; ktp. Tiuj opinioj montras, ke ankaŭ la internacia Esperantomovado disvolviĝas ligitante



strikte kun la aktualaĵoj de la nuna epoko. Kaj el tio oni povas vidi klare la vivipovon de Esperanto.

La Ĉina Esperantista Delegacio ĉeestis la grandiozan kongreson, dum kiu ni vaste kontaktis en intima atmosfero kun esperantistoj de diversaj vivsferoj el pli ol kvindek landoj. Aparte menciinde estas, ke multaj orienteŭropaj esperantistoj tiel kaj tiel memorigis la paseon babilante kun ni. En la tridekaj jaroj ili legis niajn esperantajn eldonaĵojn, tradukis nemalmultajn artikolojn el ili kaj publikigis en ĵurnaloj kaj gazetoj de sia lando. Tiutempe, iliaj popoloj kaj la nia same estis subpremataj de imperiistoj kaj reakciuloj. Ni havis en la koro senton de komuna sorto. Kaj hodiaŭ, rememorante tion, ni estas ankoraŭ profunde kortuŝitaj. Iuj legadis plurjare EPC, kaj nun menciante la gazeton ili diris: "Tre bedaŭrinde, delonge ni ne povas ĝin akiri!" Ankaŭ latinamerikaj esperantistoj diris, ke ili pli kaj pli konas la novan Ĉinion dank' al la esperanta dissendo de Radio Pekino.

Kaj min persone trafis nemalmultaj emociaj aferoj. Mi tute ne atendis, ke en la kongreso mi renkontiĝis kun dana amiko, sempatologo D-ro Paul Neegaard, post tridekjara ĉeso de kontakto. Lia Sempatologia Instituto en Kopenhago havas multajn esplorist-studentojn el landoj agrikulture

alte evoluintaj. Li, kvankam grandaĝa, laboras pli kaj pli multe. Malgraŭ tio, li diris, ke li volas fari ion por la modernigo de agrikulturo en Ĉinio aŭdinte pri la afero.

Cetere, granda evento en la Esperanto-literaturo estas, ke oni eldonis la tradukon de «Don Quijote», fama hispana klasikaĵo. La estraro de UEA aparte donacis al nia delegacio unu ekzempleron kun kolektivaj subskriboj kiel signon de amikeco al Ĉinio. Ekfoliuminte mi rimarkis, ke la tradukinto estas la sama F. de Diego, kiu tradukis mian romanon «Montvilaĝo» en la hispanan lingvon. La traduko eldoniĝis en la industria urbo Barcelono dense loĝata de laboristoj. Ni perdis la rilatojn antaŭ pli ol tridek jaroj. Kiel ĝojinde, ke hodiaŭ dank' al «Don Quijote» en Esperanto, mi informiĝis pri li!

Nia mondo vere tre malgrandiĝis, rapide mallongiĝis la geografia distanco inter la homoj, dum restas la obstina baro de lingvoj! Kaj ni devas malŝpari multe da tempo el nia efemera vivo por lerni fremdajn lingvojn! Kiel malracie! Kiel disipe! Estas jam tiel evidenta la graveco de Esperanto. Ĝia naskiĝo estas rezulto de la homara evoluado. Kaj hodiaŭ ĝi mem, per sia vigla disvolviĝado dum pli ol 90 jaroj, pravas, ke ĝi estas bezonata de la epoko.

## Sukcesa turneo

**D**E la 28-a de sep. ĝis la 19-a de okt. de 1978, la Ĉina Pupteatra Trupo kun Kamarado Sun Jiming kiel la estro kaj Kamarado Feng Ŝuhang kiel la vicestro faris sukcesan viziton al Jugoslavio, kaj revenis al Pekino je la 20-a de la sama monato.

La trupo partoprenis en la 12-a Internacia Teatra Festivalo kaj la 11-a Pupteatra Internacia Festivalo. Ĝi vizitis unu post alia la urbojn Beogradon, Zagrebon, Varaĵdin, Ĉaĉak kaj Brĉkon, faris 13 prezentadojn por la jugoslava

publiko kaj kromajn prezentadojn al laboristoj kaj infanoj. Intertempe la geaktoroj vizitis fabrikojn, la malnovan domon de Prezidanto Tito, tombejojn de martiroj, infanĝardenon kaj aliajn vidindejojn.

La du festivaloj ĉiujare okazas respektive en Beogrado kaj Zagrebo. Ĉijare Ĉinio unuafoje partoprenis en tiuj du aktivadoj. En la unua festivalo ĉ. 20 ensembloj el diversaj landoj faris pli ol 30 prezentadojn de dramoj kaj pupteatraĵoj. En la dua festivalo ensembloj el Ĉinio,

Jugoslavio, Pollando, Hungario kaj Bulgario faris 14 prezentadojn de pup teatraĵoj. La ĉina trupo prezentis la programerojn “Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco”, “La Monto Giaŭĉeng”, “Tito — Libereco”, “Danco kun Longa Tamburo” kaj “Kantante Ni Iras al Pekino”; 4ensem-


bloj de Jugoslavio ludis siajn pup teatraĵojn; 3 ensembloj el Pollando, Hungario kaj Bulgario prezentis siajn programerojn en Esperanto. Ĉiuj tiuj teatraĵoj ricevis bonan akcepton kaj varman laŭdon ĉe jugoslavaj publiko kaj esperantistoj.



*Norvegaj esperantistoj kaj ĉinaj aktoroj antaŭ la malnova domo de Prezidanto Tito*

La “Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco” ludita en Esperanto estas ĉina klasika mita teatraĵo. Ĝiaj intrigoj kaj esprimmaniero de la ĉina tradicia stilo vekis grandan intereson kaj rikoltis laŭdojn de la spektantoj kaj esperantistoj. Ofte okazis tia kortuŝa sceno, ke tuj post la fino de prezentado multaj rigardantoj suriris la scenejon, invadis en salonon kaj ĉirkaŭis ĉinajn geaktorojn por ilin gratuli pro la sukceso en la ludo kaj petis ilin subskribi. La ĉina trupo gajnis la fakan premion, la infanan premion kaj la oficialan apartan mencion pro granda lingva laboro farita en tre mallonga tempo; la ĉina aktoro An Ziming gajnis la trian lingvan premion. Dank’ al la du festivaloj, la ĉina trupo ne nur pliigis la amikecon kaj interkompreniĝon kun la pupistoj de aliaj landoj, sed ankaŭ lernis bonan sperton de alilandaj artistoj.

*La membroj de la Ĉina Pupteatra Trupo post la 11-a Pupteatra Internacia Festivalo*




La Ĉina Pupteatra Trupo venis al Jugoslavio ĝuste post kiam Hua Guofeng, prezidanto de CK de KPC, vizitis ĝin kaj faris sukcesajn interparoladojn kun Prezidanto Tito, kaj tie ĝi estis varme bonvenigata kaj amike akceptata. Dum la vizitado ĝin intime akceptis gvidantoj de la respublikoj kaj urboj, kiujn ĝi vizitis.

Du laborantoj de nia redakcio vizitis kune kun la trupo kaj faris intervjuojn.



*Blanka Boškovič, EPC-peranto kaj ĉinaj geaktoroj sur strato de Beogrado*



*(De maldekstre) Usona amiko Ĝim Kuŝino, Sarajeva esperantisto Senad Ĉolič, nia peranto Zijo Ajdinovič en Sarajevo kaj lia filino en ĝoja interparolado kun nia raportisto*



*Ĉinaj aktoroj inter jugoslavaj geknaboj*

# Intervjuo kun Fraŭlino Spomenka



Fraŭlino Spomenka Štimec (maldekstre)

*Dum la restado en Jugoslavio ni intervi-diĝis kaj amikiĝis kun multaj esperantistoj kaj havis agrablajn paroladojn kun ili. Tamen, tiu kiu plej profunde impresis nin estis Kamaradino Spomenka. Kiel estrino por kulturaj aranĝoj de la Internacia Kultura Servo, ŝi akompanis la Ĉinan Pupteatran Trupon en vizitado al 4 el la 6 vizititaj urboj kaj tiel formis profundan amikecon kun ni. Krom plenumi ĉiutagan taskon pri aranĝo de tagordo, manĝo, veturigo kaj prezentado, ŝi ankaŭ laboris por la trupo kiel anoncistino kaj klarigistino de la teatraĵo. Ŝiaj voĉo kaj elparolo estas tiel belaj kaj emociaj kiel tiuj de profesia aktorino, pro tio ni ametitulis ŝin "nia elstara aktorino". La sukcesoj atingitaj de nia trupo en Jugoslavio estas nedisigeblaj de ŝia kunlaboro. Ŝiaj gastamo, varmkoreco al ĉinaj kamaradoj kaj serioza laborstilo multe kortuŝis nin. Antaŭ la adiaŭo al ŝi ni intervjuis ŝin. Ĉi-sube estas ŝiaj respondoj.*

## Raportistoj de EPC

**Dem.:** Ĉu vi povas diri kelkajn vortojn pri la rolo de Esperanto ludata en la pasintaj 10 pupteatraj festivaloj?

**Res.:** Dum la pasintaj 10 jaroj Esperanto estis la neŭtrala esprimilo per kiu la teatroj el diversaj popoloj kaj lingvoj alproksimigis sian puparton al jugoslava publiko kaj klopodis krei inter si senperajn kontaktojn.

**Dem.:** Kian impreson vi havas pri la Ĉina Pupteatra Trupo?

**Res.:** La Ĉina Pupteatra Trupo prezentis ĉe PIF spektaklon neniam viditan. Ĝi montris al

ni la kulminon de majstra puparto, kaj ĉiuj pupistoj kaj spektantoj povis multe ĝui kaj lerni.

**Dem.:** Kiel vi opinias pri la ĉijara pupteatra festivalo?

**Res.:** La plej granda atingo de la ĉijara PIF estas la fakto, ke ĝi okazis en 2 landoj — en Jugoslavio kaj Norvegio, kaj ke ties jugoslavan parton partoprenis la ensemblo el Pekino, kiu ludis en Esperanto. La prezentiĝo de ĉina spektaklo en Esperanto multe helpis ne nur al famigo de la ĉina pupteatro, sed ankaŭ por informado pri Esperanto. Jugoslava publiko per tiu ago konatiĝis pri Esperanto kiel vera internacia lingvo kiu povas alproksimigi homojn kaj artojn senkonsidere pri tio, kiom geografie ili foras unu de la alia.

**Dem.:** Kiel ni esperantistoj de Ĉinio kaj Jugoslavio devas uzi nian lingvon por akceli la amikecon kaj interkompreniĝon de niaj du popoloj?

**Res.:** Jugoslavio kaj Ĉinio ĝis nun estis ĉefe ligitaj per informoj tra El Popola Ĉinio. Tiu konstanta kaj regula kontakto nun alkreskis al la nova faro — al la kontakto de la ĉina pupteatra kulturo pere de la internacia lingvo.

Mi esperas ke en estontaj kontaktoj inter niaj 2 landoj Esperanto ne estu nur unufoja kaj nekutima alproksimigilo sed ke ĝia rolo kresku al la nivelo, kian la internacia lingvo povas ludi en la senpera kontakto de diverslingvanoj.

.....

**Rap.:** Dankon pro viaj afablaj kaj trafaj respondoj.

# Ĝoja renkontiĝo

## de fratinoj en Pekino

**E**N septembro de la pasinta jaro okazis en Pekino la Kvara Tutlanda Kongreso de Ĉinaj Virinoj, kiun ĉeestis preskaŭ du mil reprezentantoj el pli ol 50 naciecoj de la tuta lando. Ĝi vere estis senprecedence grandioza kunveno en la historio de la ĉina virina movado. Ĉisube ni prezentu al niaj legantoj kelkajn fragmentojn de la kongreso.

### INTIMA INTERVIDIĜO

Kortuŝa sceno aperis kiam franjoj, maljunaj gvidantinoj de la virina movado, venis inter la reprezentantojn.

78-jara blankhara Caj Ĉang, subtenate de aliaj, venis en la kunvenejon de la Hunan-provinca delegacio. Oni tuj rapidis al ŝi kaj donis varmajn salutojn al kaj manpremis kun ŝi. Ŝi intime demandis la reprezentantojn pri ilia vivo kaj laboro en Pekino. Poste ŝi kore diris: "Hunan estas la hejmloko de Prezidanto Maŭ kaj la loko, kie Prezidanto Hua Guofeng laboris dum multaj jaroj, tial vi nepre devas bone labori tie."

En sia juneco Franjo Caj jam aliĝis al la societo Hinminhjuhuj organizita de Kamarado Maŭ Zedong. En 1919, sub iniciato de Kama-



*K-dino Deng Jingcāi intervidiĝas kun reprezentantoj.*



*K-dino Ĉaj Ĉang  
inter reprezentan-  
toj*

rado Maŭ Zedong, ŝi senhezite kune kun sia frato Ĉaj Hesen veturis al Francio por partatempe studi kaj partatempe labori. Sia revolucia entuziasmo skuis tiam la ĉinan socion. Ŝi per sia revolucia agado donis eminentan ekzemplon por la ĉinaj virinoj por ke ili frakasu la feŭdan katenon metitan de la malnova socio, iru al socio kaj partoprenu en revolucio. Kaj de tiam ŝi brave bataladis kelkdek jarojn por la ĉina revolucio kaj liberiga afero de la virinoj.

Luo Kiuĵue, estrino de la Hunan-provinca delegacio, diris: “En sia juneco Franjo Ĉaj donis modelon por la virinoj de Hunan-provinco en partopreno en la revolucio. Ni nepre devas lerni de ŝi kaj diligente labori.” La reprezentantoj diris al Franjo Ĉaj, ke ili certe gravuros ŝiajn vortojn en la koron. Franjo Ĉaj ĝoje ekridetis.

En la kunveno por la Henan-provinca delegacio la reprezentantoj ĉirkaŭis Franjon Deng Jingĉaŭ — edzinon de la forpasinta Ĉefministro Ĝou Enlaj.

Tiam oni nature ekmemoris Ĉefministron Ĝou, kiu dediĉis sian tutan energion al la revolucio.

Larmoj brilis en iliaj okuloj kaj iuj eĉ ne povis sin deteni de mallaŭta plorado. La reprezentantoj sciis, ke ankaŭ Franjo Deng batalis por la ĉina revolucio kaj liberigo de la virinoj de sia juneco kaj faris eminentajn kontribuojn dum dekoj da jaroj. Tamen ŝi kondutas modeste kaj laboras sinforgese eĉ en tia granda aĝo.

Firmvola kaj afabla Franjo Deng bone konis la koron de ĉiuj. Ŝi diris: “La homa vivo estas limigita, sed servado al la popolo senlima. Ni devas fari virinan laboron en la nova periodo diligente sed ne frivole, kaj fariĝi intimuloj de la virinoj. Ni virinoj devas forigi humilecon kaj preni sur nin gloran mision asignitan de la Partio kaj la ŝtato.”

La vortoj de Franjo Deng kiel fajro varmigis la koron kaj lumigis la vojon al ĉiuj, kaj ili esprimis unu post alia sian decidon nepre klopodi por modernigi niajn agrikulturon, industrion, sciencan kaj teknikon kaj nacidefendon.

Franjo Kang Keking ĉeestis kunsidojn de naŭ delegacioj inkluzive tiujn de Gianghi-provinco kaj la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj vizitis la reprezentantojn de samlandanoj el

Hongkongo kaj Aŭmen, patriotaj kaj fame konataj personoj. Kie ŝi estis, tie aŭdiĝis varmaj aplaŭdoj. Kiam ŝi venis al la delegacio de Hingiang, la diversnaciecaj reprezentantoj tre ĝojis. Estrino de la Virina Asocio de Karamai Vu Suhua estis estrino de la unua virina putbora taĉmento de Karamai-petrolkampo. Ŝi kun profunda korsento rakontis kiel Prezidanto Ĝu De kaj Franjo Kang inspektis la petrolkampon en 1958 kaj la taĉmentanoj feliĉe renkontiĝis kun ili. Ŝi raportis al Franjo Kang, kiel la laboristinoj kaj oficistinoj de la petrolkampo persistis en produktado malgraŭ la ĝeno de la "kvarpersona bando". Franjo Kang ĝoje laŭdis ilin.

Franjo Kang estas afabla kaj facile alirebla. En sia tre juna aĝo ŝi jam partoprenis en la malfacila 25,000-lia Longa Marŝo. Oni neniam forgesos ŝian revolucionan kontribuon.

### SUR LA NOVAN VOJON DE ANTAŬENMARŜO

La kongreso elmetis noblan taskon por la ĉinaj virinoj en la nova periodo. En sia raporto Kamaradino Kang Keking diris, ke por efektivigi tiun noblan taskon, la ĉinaj virinoj devas fari novajn kontribuojn en la tri revolucionaj mo-

vadoj, bone plenumi postfrontan servadon al efektivigo de la kvar modernigoj, zorgeme kulturi revolucionajn posteulojn, bone trakti geedziĝon kaj familion per socialisma penso, plifortigi kaj disvolvi unuecan fronton de virinoj en kaj ekster la lando.

Tiu nobla tasko kiel klariono alvokas centmilionojn da virinoj sur la vojon al la kvar modernigoj.

Ili diris, ke konstrui la modernan socialisman patrolandon estas nepre irenda vojo de la ĉinaj virinoj por pliapaŝa liberiĝo. Ili varme esprimis, ke oni devas disvolvi gloran tradicion de la ĉinaj virinoj kaj ludi rolon kiel viroj en efektivigo de la ĝenerala tasko de la nova periodo. Pli ol dudek veteranaj ruĝarmeaninoj, kiuj partoprenis en la Longa Marŝo, aspektas tute vicleplenaj. Veng Lin, kiu partoprenis en la revolucio en sia aĝo de 13 jaroj, nun estas gvidantino de la virina sekcio de sindikato de la Ĝengĝoŭ-a Fervoja Buroo. Ŝi diris: "Antaŭe ni virinoj faris la Longan Marŝon. Nun ni decidis nepre efektivigi la kvar modernigojn. Kvankam mi jam maljuniĝis, tamen mia batalvolo estas firma. Mi nepre gvidos la virinojn por fari novajn kontribuojn en la nova longa marŝo."



*K-dino Kang Keking intime interparolas kun reprezentantoj.*

Veterana ruĝarmeanino, vickomisaro de la Ĝenerala Hospitalo de la Vuhan-aj Trupoj, Kamaradino Ĝang Su diligente studas pri medicino. Malgraŭ sia okupateco, ŝi 57-jara tamen persiste vizitas fremdlingvan kurson. Nun ŝi jam povas legi fremdlingvajn medicinajn materialojn helpe de vortaroj. En 1977 ŝia hospitalo sukcese elfaris medikamenton kontraŭ limfa kancero kaj pro tio ĝi ricevis la unuan premion en la Tutlanda Scienca Kongreso. Ŝi esprimis ke ŝi faros la novan longan marŝon sekvante Prezidanton Hua kun la revolucia spirito, kun kiu ŝi plenumis siatempe la Longan Marŝon de 25,000 Lioj sekvante Prezidanton Maŭ.

“Ĉinio devas havi siajn unuaklasajn sciencistinojn, inventistinojn, edukistinojn kaj specialistinojn de diversaj fakoj.” Diskutante pri tio, ĉiuj sciencaj, teknikaj kaj edukaj laborantinoj, ĉeestantaj la kunvenon, konsciis sian devon. Ili diris, ke akcelo de efektiviĝo de la kvar modernigoj estas postulo de la epoko kaj ankaŭ forta deziro de la vasta amaso de virinoj. La fame konata fizikistino Lin Lanĵing, vicestrino de la Transistora Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, esprimis decidon en la nomo de scien-

caj laborantinoj: nepre starigi bravan ambicion, forigi sian humilecon kaj disvolvi sian obstinecon por grimpi novan altajon. Ŝi diris: “Kvankam mi jam estas pli-ol-60-jara, tamen mi diligente laboros ankoraŭ 20 jarojn por efektiviĝi la kvar modernigojn de la patrolando.”

Dum la periodo de la kunveno oni povis vidi, ke iu juna laboristino ofte elpoŝigis fadenojn por sin ekzerci pri ligado en libera tempo. Ŝi nomiĝas Vu Ŝuĝen, estas avangarda laborantino de Hebej-provinco kaj teksistino de la Tria Ŝtata Kotona Ŝpinteksa Fabriko de Ŝigiaĝuang. De la komenco de 1977 ĝis la okaziĝo de tiu kongreso en 1978, ŝi ĉiumonate superplenumis la produktan taskon. Laŭ sia produktokvanto ŝi jam antaŭdate enpaŝis en la jaron 1980. Ŝi kreis ankaŭ rekordon de produktado de 480,000 metroj da ŝtofo sen difekto. Sed ŝi ne kontentiĝis pri siaj atingoj kaj decidis krei pli altan rekordon.

Reprezentantoj el la agrikultura fronto cerbumis pri la problemoj kiel bone entrepreni agrikulturon, forstumadon, brutobredadon, flankokupojn kaj fiŝadon per scienca metodo por sufiĉe provizi la grandan armeon de la nova longa marŝo.





*Vu ŝuĝen (meze) en laborado*



# *Pejzaĝoj en pekinaj parkoj*


Ruĝa foliaro sur Hiangŝan-monto







Blanka Pagodo  
en Bejhaj-parko



Bijun-temple

# Kanto al la ĉinaj patrinoj

En oktobro de 1978, pli ol 600 junaj pioniroj torentis en la kunvenejon de la Kvara Virina Kongreso, en la nomo de la 200 milionoj da infanoj, prezentis belajn florojn kaj laŭtlegis tiun ĉi poemon al la patrinoj. Ĉisube estas tradukaĵo de ĝi kun ioma mallongigo.

**La Red.**

Aŭskultu, kiel laŭte  
sonoras niaj klarionoj,  
rigardu, kiel ni bonorde  
marŝadas en kolonoj!  
Ni kuras al ĉi loko,  
kun ĝojaj krioj kaj vivojoj,  
alkuras ni, samkiel fluoj  
torentas kun flosantaj floroj  
kaj milda bruo . . .  
Kun la plej belaj bondeziroj  
de l' juna  
generacio  
ni venas vin saluti  
kaj lerni de vi kun pasio!  
Salutojn! Vi reprezentantoj gloraj  
de l' granda virinaro ĉina!  
Salutojn! La plej karaj niaj  
patrinoj kaj onkloroj!

Jen kio? Kial en la tondr' aplaŭda  
mi aŭdas ke pluvetas  
larmeroj kun murmur' mallaŭta;  
ho, kial sur vizaĝoj  
ridantaj kiel floro,  
trembrilas jen perloj de ploro?!  
Ho, mi jam scias,  
avinoj, ĉar nun  
vi rememoras pri la pasintaĵoj . . .  
Vi rememoras pri la  
senĝojaj infan-jaroj;

vi rememoras, kiel barbare  
bienulaĉoj vin malgrasajn igis  
labori bove kaj ĉevale.

Mi scias, onjoj, ĉar via koro  
ĝojegon spiras!  
Ja ĉiam vi feliĉon  
al ni deziras,  
kaj miloj kaj dekmiloj  
da ruĝarmeanoj, okavojaj armeanoj  
kaj kompartiaj veteranoj  
en venko marŝis  
tra la neĝmontoj kaj l' herbej' marĉoza,  
malegoisme uzis ĉiun sian  
vivantagon  
por ke l' kvinstela flago  
hisiĝu alte super Tian-anmen-pordego . . .

Ni scias, panjoj,  
ĉar vi tutkore sentas  
dankegon.  
Vi dankas la Partian CK-on  
kaj Prezidanton Hua,  
ke ili de l' ĉielo  
forpelis nigrajn nubojn  
kaj savis nin de l' ungoj  
de l' "kvarpersona bando",  
redonis al ni la standardon  
de torĉ' kaj stelo\*!



Ho, vi kontente ekridetas!  
Ne nur pro l' laŭdmencio  
de viaj faroj meritplenaj  
por la revolucio,  
ne nur pro tio,  
ke vi fariĝis respektindaj sturmulinoj,  
labormodeloj kaj sekretarioj . . .  
sed ankaŭ ĉar vi vidas,  
ke kvankam ja malgrandaj  
ni tamen scias tiel grandan  
la veron de revolucio.

Ĉu ne pro tio?  
Ĉu ne pro tio?  
En efektivo  
eĉ pli ampleksa  
ol ĉio tio  
ja estas nia scio!

Ni scias, ke vi  
bravaj virinoj de Ĉinio  
batalis unuj tuj sekvante aliajn  
sen timo al sangad' kaj mortoblekoj  
por fal' de l' tri montegoj\*\*!  
ni scias, ke vi  
patrinoj kaj onkloroj bonaj,  
ja taskon pli penigan havas  
ol niaj patroj, onkloroj,  
ĉar krom batali brave  
ŝultron ĉe ŝultr' kun ili  
vi devas ankaŭ  
nin nutri kaj konsili . . .

Vi estas  
ti-kiuj donis al ni l' unuan  
plenbuŝon da lakt' kun bonodoro,  
vi estas  
ti-kiuj donis al ni l' unuan  
ĝojegon de naskiĝa horo,  
vi estas  
ti-kiuj nin per man' al mano instruadis  
kiel komenci la laboron,  
vi estas

ti-kiuj nin instruis ami la socialismon  
de kor' al koro.

Se ni ekfalas  
sur nekonata vojo  
kaj laŭte ploras,  
vi levas kaj ekprenas  
nin firme  
en vian sinon,  
forviŝas niajn larmojn  
kaj al ni montri penas,  
ke l' vojo  
ja malebenas . . .

Se ni naive  
ekkrias al vi:  
"Deprenu por ni stelojn!"  
vi tuj aldonas  
al la infana revo  
flugilojn la sciencajn,  
nin kuraĝigas lerni diligente,  
ke, kiam plenkreskiĝos, ni konkeru  
la lunon kaj la Laktan Vojon,  
malkaŝu la sekretojn  
de l' universo! . . .

Ni ankaŭ scias,  
patrinoj kaj onkloroj bonaj,  
ke ege malfacilas  
eduki nin infanojn!  
Ja iuj el ni emas plori  
kelkiam ekpetoli;  
kelkiam ni kverelas,  
regulojn malobservas.  
Sed vi neniam malesperas,  
se foje vi ekĝemas  
sen nia vido,  
vi tuj kun ridmieno  
nin gvidas  
al hela suntereno.  
Vi zorgas pri ni  
samkiel delikataj  
mezuraj aparatoj . . .

. . . . .

Kiel ni povas ĉion tion  
forgesi?

Ni dankos vin pro tio  
dum tuta l' vivo,  
dum tuta l' vivo . . .

Ni ankaŭ scias,  
patrinoj kaj onklinoj bonaj,  
ke tiel vi laboras  
ne por profito via,  
eĉ ne por via familia  
konforta vivo,  
sed nur pro tio,  
ke ni ja estas floroj de l' patrio,  
kaj en l' okuloj viaj  
ni belas pli ol floroj . . .  
Ĉar ni ja estas daŭrigantoj  
de la revolucio,  
ni estas ne nur la daŭrigo  
de l' vivo via  
sed ankaŭ la daŭrigo  
de l' idealo via . . .

Ĉu nia diro pravas?  
Vi certe diros:  
"Pravas, infanoj, pravas . . ."

Do estu  
trankvilaj!  
Estu trankvilaj,  
reprezentantoj  
de l' granda ĉina virinaro!  
Niaj patrinoj kaj onklinoj  
plej karaj!

Kun via  
senĉesa vivopulso,  
kun via  
ruĝega pura sangofluo  
laŭ via bela  
ideal-kurso  
el viaj manoj ni transprenos  
la ruĝan flagon.

Samkiel vi faris  
la Longan Marŝon  
sekvante Prezidanton Maŭ kaj  
Ĉefministron Ĝoŭ,  
ni tiel faros  
plu longan marŝon  
sekvante Prezidanton Hua kaj l'  
Partian CK-on!

Laŭ via voj' batala,  
sekvante vian spuron,  
ni marŝos per firmegaj paŝoj  
en la jarcenton dudekunuan,  
por la efektivigo  
de la kvar modernigoj.  
Nun ni lernadas  
por la jarcent' dudekunua.  
Ni ĉiam estas pretaj  
por la jarcent' dudekunua.  
Ni certe batalados  
dum tuta l' vivo  
en la jarcent' dudekunua,  
por finkonstruo  
de komunismo via  
kaj ankaŭ nia!  
Ĉi tio estas nia hodiaŭa  
promeso plej sonora  
al la patrinoj,  
ĉar ni ja trovas,  
ke nur tributo tia povas  
ĝojigi vin sen fino.

Ĉu ni ne pravas?  
Ĉu ni ne pravas?  
Jes, certe pravas.  
"Jes, certe pravas."  
Ja pravas!  
"Ja pravas!"

\*T. e. standardo de la Ĉinaj Junaj Pioniroj.

\*\*T. e. imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo.

# Ekstraklasa instruistino Fang Bihuj

Estis en la klasĉambro de la kvara klaso.

La anglalingva instruistino Fang iris al la podio kaj kiam la gelernantoj finis la anglan kanton "Hello, I Am Glad to See You (Haloo, Mi Tre Ĝojas Vidi Vin)!", ĝi demandis en la angla la knabinon starantan en la fronto por fari raporton:

"Who is on duty today (Kiu deĵoras hodiaŭ)?"

Ankaŭ la deĵoranto respondis en la angla: "I am on duty today (Hodiaŭ mi deĵoras)."

"What day is today (Kiu tago estas hodiaŭ)?"

"Today is Wednesday (Hodiaŭ estas merkredo)."

"How is the weather today (Kia estas la hodiaŭa vetero)?"

"It is fine today (Tre bona)."

"How many classes do you have this morning (Kiom da lecionoj vi havos antaŭtagmeze)?"

"Four (Kvar)."

"What are they (Kio estas ili)?"

"They are Chinese, Mathematics, English and Physical Training (Ili estas pri la ĉina lingvo, matematiko, la angla lingvo kaj fizikokulturo)."

"Is everybody here (Ĉu ĉiuj klasanoj ĉeestas)?"

"Yes, everybody is here (Jes, ĉiuj ĉeestas)."

La deĵoranto reiris al sia sidloko kaj Fang diris al la gelernantoj, ke ili faru konversacian ekzercon en grupetoj. Iliaj interparoloj temis pri jenaj aferoj: Mi estas pekinano, mi lernas en Ĝingŝan-lernejo, mi ŝatas lerni la anglan, mi havas feliĉan familion. Iu diris: Mi havas pliaĝan fratinton kaj frateton, mia patro estas inĝeniero kaj mia


patrino estas kirurgino. Ili prononcado estis relative ĝusta kaj ilia tono milda. La geknaboj estis naivaj kaj amindaj.

Fang Bihuj diplomitiĝis en la Pekina Fremd-lingva Instituto en la jaro 1962 kaj poste estis instalita kiel instruistino en Ĝingŝan-lernejo. Tiam ŝi ankoraŭ estis viveplena junulino kun aĝo de dudek kelkaj jaroj. Je la diplomitiĝo ĉiuj ŝiaj kunlernantoj ĝoje skribis sian deziratan profesion sur la registra papero, kaj tiam Fang Bihuj ekmemoris iun el ŝiaj bonaj instruistoj en la alta lernejo, kiu transposteniĝis al la elementa lernejo Ĝingŝan por resumi tie sperton pri fremdlingva instruado. Altlerneja profesoro fariĝis volonte instruisto de elementa lernejo — kiel admirinde! Ankaŭ ŝi tre amas instruistan profesion. Ŝi pensis, ke ŝi devas efektiviĝi sian idealon per sia laborado kiel instruisto kaj fariĝi vera inĝeniero de la homa animo. Kaj tial ŝi enskribis sian solan volon: fariĝi instruistino de Ĝingŝan-lernejo.

En la sekvantaj jaroj, ŝi instruadis la anglan lingvon al malaltaj klasoj en Ĝingŝan-lernejo. Ŝi faris vivecan instruan eksperimentadon laŭ la karakterizaĵoj de la infanoj kaj atingis bonan rezulton.

Forpasis 16 jaroj. Iuj el ŝiaj lernantoj nun laboras en fremdaj landoj, aliaj laboras en institucioj de eksterlandaj aferoj kaj triaj instruas en universitatoj. Kaj ĉiuj tiuj lernantoj hodiaŭ ne forĝesis sian instruistinton de la elementa lernejo. Ili skribis al ŝi de diversaj partoj de nia lando. Kiam ili venis por vidi ŝin, ili paroladis pri siaj pasintaĵoj de la infanaĝo kaj iuj eĉ faris petolaĵon nekonforman al ilia aĝo. Okaze de la lerneja festo je la 4-a de majo 1978, multaj el la ekslernantoj venis al la lernejo por ĝin celebri. En la ruĝa brilo de la bivakfajro, ili gaje ridis kaj





kantis kune starante anglalingvan kanton lernitan en ilia infanaĝo. Rigardante tiujn gejunulojn, ŝi sentis neesprimeblan ĝojon.

En sia hejmo, Fang Bihuj kolektis plenan keston da porinfanaj legaĵoj. Ŝia infano ne komprenis la kaŭzon kaj demandis ŝin: “Panjo, kial vi ankoraŭ legadas porinfanajn bildlibrojn estante jam plenaĝa?” “Via panjo devas doni lecionojn al la lernantoj, rakonti kaj prezenti enigmojn al ili, tial mi devas legi tion.”

Kiam tion mi skribas, la sceno vidita en la lernoĉambro de la kvara klaso denove prezentigis al mi: Fang diris al la gelernantoj, ke antaŭ ol komenci novan lecionon oni devas unue ripeti la lastan lecionon pri matena gimnastika ekzerco. Apenaŭ finiĝis ŝia vorto, kiam la gelernantoj ekstaris. La deĵoranto kriis: “Komencu!” Kaj la geknaboj ekfaris gimnastikan ekzercon kantante en la angla. Kvankam ili moviĝis ne ekzakte laŭ la sama ritmo, tamen ili ĉiuj estis en agado. Post la lecionhoro mi informiĝis, ke la infanoj jam ellernis kanti angle pli ol 50 ĉinajn kaj alilandajn kantojn inkluzive de “Remado”, “Brilaj Steletoj”, “Bonan Matenon” kaj “Ĝojan Naskiĝtagon” en unu jaro. Kaj krome ili ankaŭ povas prezenti Tablotenisan

Dancon kaj Arboplantadon Dancon, kaj teatraĵetojn “Kokeriko en Meznokto”, “Ĉasi Leporojn”, “Heroa Nigruleto” ktp, en angla lingvo. La infanoj tre ŝatas kanti, ili kantas dum leciono, post leciono kaj en sia hejmo.

Antaŭe mi jam informiĝis, ke Fang Bihuj tre emfazas lertecon kaj vivecon en sia instrua praktikado. Ŝi diris, ke la tempo kaj instruata materialo por unu leciona horo estas limigitaj, tamen la instrua arto estas senlima. Utiligante la senson kaj imitemon de la infanoj pri lingvo, ŝi turnas ĉiun lecionon en viglan aktivadon figurecan, por ke la infanoj praktike uzadu siajn orelojn, buŝon, okulojn kaj manojn en lernado. En la kantado, ludado kaj prezentado de artaj programeroj, ili iom post iom akiras la lernatan lingvon. Pro ŝia interesa instruado, la infanoj tiel ŝatas ŝiajn lecionojn, ke ili ĉiam sopiras ricevi novan lecionon de ŝi.

En la ĉiutaga vivo, Fang Bihuj tre atentis pri ĉiuj aferoj por trovi materialon utiligeblan en sia instruado. Aŭskultante muzikon, ŝi aparte atentis simplajn viglajn melodiojn por ilin adapti al lernendaj tekstoj. Dum vizito al ekspozicioj, ŝi elektadas geometriajn figurojn taŭgajn por instruado kaj rigardante filmojn ŝi atentis

pri gestoj utiligeblaj por klarigado dum instruado.

En la pasintaj dekelkaj jaroj, Fang kolektadas bildojn, faris vortokartojn kaj aliajn simplajn instruajn instrumentojn. En korektado de la ekzercoj de la lernantoj, ŝi preterlasis eĉ ne erareton, kvankam tre grandkvanta kaj laciga estis tiu laboro. Li zorge korektadis kaj donis helpojn al la infanoj unuope por bone koni la kaŭzojn de la eraroj kaj la pensojn de la infanoj. Por ke la lernantoj bone memoru la lernitajn sciojn, ŝi aperigadis regule murgazeton. Kvankam tio plipezigis ŝian laboron, tamen ŝi diris: "Vidante ke la infanoj akiras pli kaj pli multe da scio kaj novaj anglalingvaj vortoj kaj progresas en ĉiu tago, mi sentas koran ĝojon."

La eduka afero de Ĉinio estis serioze fuŝita de la reviziisma linio de Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando". La socia pozicio de la instruistoj de elementaj lernejoj estis plej malaltigita kaj la instruado de fremdaj lingvoj dronis en malfaciloj. Sed eĉ en tia situacio, Fang restis malcedema. Kun aliaj instruistoj ŝi gvidis siajn lernantojn en vizito al laborantoj de internaciaj vagonaroj kaj turisma institucio por aŭdi iliajn opiniojn kaj proponojn pri instruado de la angla lingvo, kaj per tio plialtigi la konon kaj entuziasmon de la lernantoj en lernado de la angla lingvo. Ŝia iniciatemo estis kuraĝigita kaj subtenata de aliaj instruistoj. Instruisto de belarto helpis ŝin per pentrado, instruisto de sporto helpis ŝin per projektado de gimnastikaj ekzercoj, instruisto de muziko verkis por ŝi melodiojn kaj la ĉefinstruistoj de lernogrupoj klopodis kune kun ŝi por solvi pensajn problemojn de la infanoj.

Hodiaŭ denove aperis la vivecaj scenoj en instruado de fremdaj lingvoj. Bonaj spertoj kaj metodoj trovitaj de veteranaj instruistoj estas hereditaj kaj disvolvataj. La popolaj instruistoj estas ĝenerale respektataj en la socio. Lastatempe, la Eduka Ministerio laŭdis Fang Bihuj kaj aliajn instruistojn pro iliaj rimarkindaj kontribuoj kaj ilin titolis kiel "ekstraklasaj instruistoj". Kaj krome, Fang Bihuj glorie ĉeestis la Kvaran Tutlandan Kongreson de Virinoj okazigitan en septembro de 1978.

LAŬ BAJ:

## Novaj floroj de la

**E**N la lastaj jaroj, denove vigliĝis la ĉina literatura aktivado. Precipe post la Plivastigita Kunveno de Komitatanoj de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj okazigita en junio de la pasinta jaro, multaj literaturaj kaj artaj asocioj rekomencis sian aktivadon unu post alia. Dekoj da literaturaj periodaĵoj rekomencis aperi. Publikigis krom poemoj, prozoj, romanoj kaj raportaĵoj ankaŭ noveloj de scienca fikcio, satiraj verkoj, fabloj kaj fabeloj. Eldoniĝis ankaŭ ĉinaj tradukaĵoj novaj kaj malnovaj de mondfamaj literaturaj verkoj.

Por ke literaturistoj povu krei verkojn plenajn de epoka etoso, la Ĉina Verkista Asocio organizis pli ol 260 verkistojn, poetojn, literaturajn ko-

*Verkisto Ĝou Libo*



# ĉina literaturo



Aktoro Ĝou Ĝeng voĉlegas poemon por laŭdi la grandan olekampon.

mentariistojn kaj redaktorojn de literaturaj gazetoj al la olekampoj de Ĵenkiu kaj Daking respektive en norda kaj nordorienta Ĉinio, la Fera kaj Ŝtala Kompanio de Anŝan, Kajluan-karbonejo kaj Ĉajdam-baseno de Kinghaj en nordokcidenta Ĉinio por fari vizitadon kaj verkadon.

Kune kun nombro da verkistoj, poetoj kaj famaj aktoroj mi vizitis Ĵenkiu-olekampon. En 1975 oni komencis prospektoradon al tiu tereno kaj malkovris tie grandan altproduktan riĉfonton de petrolo en malpli ol unu jaro; unuafoje oni trovis petrolon en paleozoika Ĝendan-sistema stratumo kaj boris altproduktajn putojn. Multaj poetoj kaj verkistoj emociiĝis post vizito al la olekampo kaj verkis eseojn kaj poemojn.

Poeto Gu Gong maldormis tutnokte pro emociiĝo kaj verkis poemon kun cent versoj:

*Sur l' Ebenaj' de Centra Hebej  
mi marŝas grandapaŝe —  
neniam mi imagis,  
ke sub la tero kuŝas kaŝe  
ja dinosaŭraj ostoj  
kaj vejnoj prainsektaj,  
kaj el Ĝendan-sistema la rokaro  
torentas petrol-mar.*


• • •

Iuj literaturistoj diris al mi, ke sub la tiranado de Lin Biaŭ kaj la “kvarpersona bando” al litera-

turo, la verkistoj estis mense katenitaj. Nun frakasiĝis la katenoj spiritaj metitaj al la verkistoj. “La fiŝoj naĝas mare en libero, la birdoj flugas alte en aero.” La literaturistoj ja povas nun multe fari.

Redaktoro de iu literatura periodaĵo diris, ke antaŭ kelkaj jaroj, la redakcio ricevis ĉiumonate nur apenaŭ kelkajn artikolojn, sed nun centojn da manuskriptoj en ĉiu tago, kaj inter ili troviĝas relative bonaj verkoj kun riĉa enhavo, novaj temoj kaj diversaj stiloj. La vasta legantaro konstatis, ke pompas floroj en la literatura kaj arta ĝardeno.

En la literatura ĝardeno, apartan prosperecon ĝuas noveloj. Senĉese aperadas debutantoj. La plejparto de ili estas junaj amatoroj, kiuj vivas en la amasoj, estas sentemaj pri novaj aferoj kaj kuraĝas tuŝi viv-problemojn. Liu Hinvu, la aŭtoro de la novelo “Ĉefinstruisto”, kiu ricevis multajn laŭdojn de la legantoj, estas unu el ili. Tiu novelo spegulas faceton de la lerneja vivo antaŭ kelkaj jaroj. Li skulptis en ĝi du figurojn de mezlernejaj lernantoj. Unu el ili estas lernogrupa estrino Hie Hujmin, priskribita kiel pozitiva figuro, kiu ne povas distingi pravon de malpravo sub la influo de la eraraj pensoj disemigitaj de la “kvarpersona bando”. Ŝi eĉ opinias, ke la romano “Tabano” de E. L. Voynich estas “flava” verko, kaj diras, ke la kunlernantinoj, kiuj portas flordeseĝajn vestojn, praktikas



*Rigardo al putoborado*

“burĝan vivmanieron”. Alia figuro estas kanaj-  
 leto Song Baŭki. Ambaŭ ili konis siajn erarojn  
 dank’ al kritikado farita de la instruistoj kaj  
 kunlernantoj al la krimoj de la “kvarpersona  
 bando”, kaj estis savitaj.

Ankaŭ iuj mezaĝaj verkistoj, kiuj ĉesis verki  
 por multaj jaroj, vigliĝas. La periodaĵo “Popola  
 Literaturo” aperigis lastatempe kortuŝan rakont-  
 on “Sinofero”, kies aŭtoro Lu Venfu jam nenion  
 verkis en la pasintaj pli ol dek jaroj. Dum mul-  
 taj jaroj nenion verkis ankaŭ Vang Meng, kiu  
 fariĝis rimarkinda debutanto en la komenco de  
 la kvindekaj jaroj. Li ĝoje diris al mi, ke li  
 speciale venas de Hingiang al Pekino laŭ invito  
 de iu eldonejo por revizii sian romanon. Li ne  
 naskiĝis en Hingiang, tamen pro longa vivado en  
 tiu regiono, li tre bone konas la vivon de tieaj

nacimalplimulto kaj ellernis iliajn lingvojn. Lia  
 lasta satira romano “Taĉmentestro, Sekretario,  
 Sovaĝkato kaj Duona Manĝvergo” laŭ Hingiang-  
 a popolarakonto altiris al si atenton de la litera-  
 turaj rondoj.

Lu Ĝuguo estas dramverkisto de la filmostu-  
 dio “La Unua de Aŭgusto” de ĈPLA. La filmo  
 “Brila Ruĝa Stelo”, en kies adaptado li partop-  
 renis, kaj la filmo “Sendependa Brigado” verkita  
 de li ricevis laŭdojn de la spektatoroj. Kune kun  
 li mi vizitis la familion de iu petrola laboristo.  
 Li diris, ke tie estas senfinaj novaĵoj kaj sen-  
 nombraj historioj. Antaŭe li nenion verkis pri  
 industrio kaj alveninte al la olekampo de Ĵenkiu,  
 li estis altirita de la altaj ŝtalaj turoj kaj  
 nigra nafto. Li interkonsiliĝis kun laboristo-  
 poeto Li Hjue-aŭ kaj decidis, ke li revenos de  
 Pekino post aranĝo de enmanaj laboroj kaj loĝa-  
 dos duonjaron sur la olekampo por krei verkon  
 pri petrolaj laboristoj.

En la lastaj jaroj, aperis pli kaj pli multaj ro-  
 manoj post la eldoniĝo de la historia romano  
 “Li Ziĉeng” pri kamparana insurekcio, verkita  
 de veterana verkisto Jaŭ Hjuejin. Interalie,  
 publikiĝis “La Oriento” de Vej Vej kaj “La  
 Hieraŭa Milito” de Meng Vejzaj pri la batalo  
 kontraŭ usona agreso por helpi Koreion en la  
 kvindekaj jaroj; “Kingtongpo” de Ŝa Ting pri  
 okazaĵo en fondado de popolaj komunumoj de  
 Siĉuan-provinco. En sia verko, la aŭtoro pri-  
 skribis la humuran karakteron de siĉuanaj kam-  
 paranoj per ilia dialekto. La lastatempe aperinta  
 romano “Ekvarmiĝo de Klifo” de verkisto Gaŭ  
 Jing, kiu estas lerta en priskribado de naciaj  
 temoj, vivece prezentas la popolon de Ji-nacieco  
 en transirado de sklava socio al socialisma socio,  
 per priskribo pri ĵi-nacieca junulosklavo, kiu  
 fariĝis revolucia batalanto.

Mi informiĝis ankaŭ ke kvankam iuj el la ve-  
 teranaj verkistoj estas jam tre grandaĝaj, tamen  
 ili estas energiplenaj. La fama verkisto Bakin  
 estas esperantisto, kiu ĉinigiis la romanon “Prin-  
 tempo en la Aŭtuno” por la legantaro de nia  
 lando. Nun li estas jam 75-jara kaj sin okupis pri  
 literatura aktivado dum duona jarcento. En la  
 pasinta jaro, li faris planon krei unu romanon,  
 du kolektojn de noveloj kaj traduki fremdlandajn




*(De maldekstre) verkistoj Ĝoŭ Jang, Ĝang Guangnian, He Ĝingĝi kaj Jan Venging*

verkojn kun 1,000, 000 ĉinaj vortoj antaŭ sia aĝo de 80 jaroj. Verkisto-esperantisto Je Gjungian (Cicio Mar) verkis en la tridekaj jaroj novelaron en Esperanto titolitan “Forgesitaj Homoj” kaj esperantigis ĉinan novelaron “Nova Tasko”. Nun li estas verkanta romanon “Tero” kun 1,000,000 ĉinaj vortoj. Tiu romano konsistas el tri partoj, nome “Fajrero”, “Libero” kaj “Aŭroro”. La parto “Libero” jam aperis en la literatura serio “Oktobro”.


Fama dramverkisto Caŭ Ju skribis en la tridekaj jaroj la dramojn “Fulmotondro” kaj “Sunleviĝo”, per kiuj li forte frapis la feŭdan sistemon de la malnova Ĉinio. Nun li verkas histo-

rian dramon “Vang Ĝaŭgjun”, kiu temas pri edziniĝo de Vang Ĝaŭgjun, konkubino de hana imperiestro, al huna ĉefo por amikigi la du naciecojn. Malgraŭ sia alta aĝo de 68 jaroj, Caŭ Ju veturis al la Interna Mongolio kaj Hingiang por persone koni tiean vivon. Per sia propra vivsperto li profunde sentis la solidarecon inter la frataj naciecoj kaj akiris bazon por kreado de la arta figuro de Vang Ĝaŭgjun. Li diris, ke la verkado de “Vang Ĝaŭgjun” ja celas plifortigi la unuiĝon de la naciecoj kaj kontribui al la konstruado de la patrolando kaj efektiviĝo de modernigo de agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj teknikoj de Ĉinio.



# Kunveno de scienco kaj amikeco

de VANG DAGJUN



**E**N aŭgusto de la pasinta jaro, okazis en Varsovio la XI-a Internacia Kristalografia Kongreso. La unua programero de tiu kongreso estis debati pri la akcepto de Ĉinio kaj Egiptio kiel membroj. La reprezentantoj de ĉiuj landoj aprobis la membriĝon de Ĉinio kaj per varma manklakado bonvenigis la Ĉinan Kristalografian Delegacion estratan de Prof. Tang Jouki. Kiam finiĝis la kunsido en tiu tago, delegitoj de multaj landoj iris al Prof. Tang kaj varme manpremis kun li kaj kore lin gratulis. Multaj amikoj diris, ke la membriĝo de Ĉinio estas unu el la gravaj atingoj de tiu ĉi kongreso kaj tio markas novan disvolviĝon de la amikeco inter la kristalografoj kaj antaŭdiras, ke ili kunlaboros ankoraŭ pli bone kaj marŝos ŝultron ĉe ŝultra.

## Interŝanĝo de sciencaj informoj kaj ekspozaj standoj

Tiu ĉi kongreso superis ĉiujn antaŭajn kongresojn ne nur en nombro de la kongresanoj sed ankaŭ en profundeco kaj vasteco de la interŝanĝo de sciencaj informoj. 1,700 delegitoj kaj specialistoj el 50 landoj kaj regionoj partoprenis en la kongreso kaj ĝi ricevis pli ol 1,400 sciencajn disertaĵojn. Tio pruvis, ke la mondo alte taksas tiun sciencon fakon.

Kristalografio estas scienca fako pri formo, strukturo, kreskado kaj

ecoj de kristaloj. Ĝi estas grava rimedo por koni la strukturon de materio por pli profunde studi kemion, fizikon, biologion, metalurgion ktp.

Dum la kongreso, la kolegoj diverslandaj ĝoje kunvenadis, kune esploris sekretojn de kristalografio kaj faris vastan interŝanĝon de sciencaj informoj. Diversaj estis la formoj de aktivado. Okazis raportaj kunsidoj, malgrandaj kursoj kaj multaj ekspozaj standoj, kie diverslandaj sciencistoj montris laŭfakesiajn disertaĵojn, koncernajn grafikakajojn, fotojn, modelojn kaj objektojn kaj persone respondis demandojn de vizitantoj. En kaj ekster la halo ĉie troviĝis diversaj ekspozajoj. La specialistoj diverslandaj pririgardis kaj lernis unu de alia en vigla atmosfero kun rimarkinda efiko.

## Ĉe la ĉina stando

La disertaĵoj kaj modeloj ekspozataj de la ĉina delegacio vaste interesis eksterlandajn kolegojn. Precipe la glima solkristalo kun grandeco de 10 cm × 10 cm altiris apartan atenton de fremdlandaj sciencistoj pro sia eksterordinara dimensio, kompleteco kaj senmanka strukturo. Iu amiko ĝin pririgardis eĉ tri fojojn kaj diris laŭde: "Vere mirinde granda!" S-ro Ŭatanabe Dengiro, fizika profesoro de Kioto-universitato de Japanio, diris sincere post pririgardo: "Kiel membro de la redakcia komitato de la in-

ternacia gazeto 'Aplika Kristalografio' mi esperas, ke niaj ĉinaj kolegoj publikigos sian disertaĵon pri glima solkristalo en nia gazeto." Iu itala sciencisto kiu estis verkanta libron pri rektmetoda determinado pri la strukturo de solkristalo tre interesiĝis pri disertaĵo verkita de ĉina sciencisto pri solvado de multsolva problemo renkontita en determinado pri strukturo de solkristalo per rekta kaj nereakta metodoj en kombino, kaj diris ke li notos tiun metodon en sia verko.

Dum pririgardo de la ekspozajoj de la ĉina delegacio, multaj amikoj el landoj de la tria mondo aparte montris zorgon pri la scienca esplorado de nia lando, krom diskuto pri sciencaj problemoj. Kiam ili informiĝis, ke la scienca afero de nia lando estas en sezono "kune floru cent floroj kaj voĉojn donu cent skoloj", ili tre ĝojis pro tio.

## Ĝoja renkontiĝo de novaj kaj malnovaj amikoj

Per pririgardo de ekspozajoj kaj interparoloj, la ĉinaj delegitoj ricevis multajn utilaĵojn el la sukcesoj atingitaj de siaj eksterlandaj kolegoj. Ili plene informiĝis precipe pri la direkto kaj nivelo de la disvolviĝo de la internacia kristalografio, rimarkis siajn mankojn kaj plifortigis sian memfidon kaj decidemon pri plirapidigo de la esplorado de kristalografio por frue efektivigi modernigon de agrikulturo, indus-

trio, nacidefendo, sciencoj kaj teknikoj de nia lando.

Ĉifoje la ĉinaj sciencistoj venis al Varsovio ne nur por interŝanĝo de sciencaj informoj, sed ankaŭ por amikeco. Ili estis profunde kortuŝitaj de la akceptado de Ĉinio kiel membro de la Internacia Unuiĝo de Kristalografio, en la unua tago.

Prezidanto de tiu ĉi kongreso Prof. A. Magneli de Svedio skribis en sia letero al la Ĉina Akademio de Sciencoj pri la membriĝo de Ĉinio: "En la nomo de la Internacia Unuiĝo de Kristalografio ni esprimas grandan kontentiĝon pri la membriĝo de la Ĉina Akademio de Sciencoj al la Unuiĝo kaj ni sentas senkomparan ĝojon pro la unuaniĝa aprobo de tio per manklakado. Ni arde esperas vaste kunlabori kun

niaj ĉinaj kolegoj en la sfero de kristalografio."

La fama angla kristalografino Prof-ino Dorothy Hodgkin estis eksprezidantino de la Internacia Unuiĝo de Kristalografio kaj malnova amikino de ĉinaj sciencistoj. Meze de la kvardekaj jaroj, Prof. Tang Joŭki jam konatiĝis kun ŝi en Usono. De la jaro 1959, ŝi kvarfoje vizitis Ĉinion kaj starigis intiman rilaton kun multaj ĉinaj kolegoj. Aparte menciinda estas tio, ke en la IX-a Internacia Kristalografia Kongreso okazigita en 1972 en Tokio, ŝi persone faris sciencaĵparoladon titolitan "En Komparo kun la Monda Nivelo" por prezenti la sukceson atingitan de Ĉinio en esplorado pri insulino. Ŝi varme diris: "Ĉinaj junaj sciencistoj dili-

gente faris altnivelan esploradon." Kvankam Prof-ino D. Hodgkin estis tre okupata kaj krome tre grandaĝa, tamen en la lasta kongreso ŝi atente pririgardis foje kaj refoje la ĉinan ekspozan standon malgraŭ laceco kaj montris tre profundan amikecon al la ĉinaj popolo kaj sciencaj laborantoj.

Dum sia restado en Pollando, la ĉina delegacio profunde sentis amikecon de la pola popolo. Ĉu dum la kongreso aŭ vizitado al aliaj lokoj, polaj amikoj ĉiam varme prizorgis kaj amike akceptis ĝin. La ĉinaj sciencaj laborantoj tre ĝojis kaj esprimis profundan dankon por tio. Kiam la Ĉina Kristalografia Delegacio forlasis Pollandon, ĝi esprimis sian koran deziron, ke la polaj sciencistoj atingu ankoraŭ pli grandajn sukcesojn.

*La Ĉina Kristalografia Delegacio kaj polaj kolegoj*



# En la geknaba domo de Ŝanhajo

**E**KSTAZA melodio flugas el la nacimuzika ĉambro de la Geknaba Domo de Ŝanhajo. Puŝmalfermite la pordon de la ĉambro, mi vidis nacimuzikan orkestron konsistantan el pli ol 40 geknaboj kun ruĝa koltuko. Nun ili ludas «Printempan Matenon ĉe Verda Lago» de la ĉina fama komponisto Nie Er.

La ludon direktas instruisto Lu Gian-je de la Ŝanhaja Konservatorio. Li estis unu el la unuaj membroj de la Nacimuzika Orkestro de la Geknaba Domo kaj ludis *erhu*-on (ĉina dukorda arĉ-muzikilo). Sub la helpo de instruanto li iom post iom komprenis, ke la ĉina nacia muziko havas riĉan tradicion kaj oni devas diligente lernadi por heredi ĝin. Li forte interesiĝis pri muziko. En du jaroj li lernis ludi plurajn

blov-, pluk- kaj perkut-muzikilojn. Poste li studis en la Ŝanhaja Konservatorio kaj fariĝis ĝia instruisto post sia diplomitiĝo. Li ne povas forgesi la vivon de la knabeco kaj tre amas infanojn, tial li venadas al la Geknaba Domo unu fojon en ĉiu semajno por helpi la orkestron en ĝia ekzerco. Dank' al lia helpo rapide altiĝas la nivelo de ludarto de la orkestro. En la lastaj du jaroj, la orkestro jam lertiĝis en ludado de la kompozicioj «Marŝo al la Kvar Modernigoj», «Danco de Jaŭ-nacieco», «Purpura Bambuo» k.a.

La nacimuzika grupo estas unu el la pli ol 20 diversaj grupoj de la Geknaba Domo. La Geknaba Domo establiĝis en 1953. En ĝia korto etendiĝas granda gazono ĉirkaŭata de floroj kaj



La Geknaba Domo  
de Ŝanhajo




arboj. La fronta domo havas interne plankareon de 3,300 kvadrataj metroj. En 1965 oni konstruis tie Sciencan-teknikan Doman, Planetarion, Oratorejon, Teatron k. s., kiuj duoble grandigis la konstruan areon de la Geknaba Domo. Kaj ĉiuj konstruaĵoj povas samtempe akcepti pli ol 10,000 geknabojn por diversaj aktivadoj.

Mi venis en la dancekzercejon kun grandaj speguloj sur la muroj kaj vidis, ke instruistino Vu Mejĝen direktas geknabojn en ekzercado de la baletto «Kanto de Tempo».

Bonstatura knabineto kun plaĉa vizaĝo facilmove turniĝante flugas en la spacon. Ŝi estas la heroino en la baletto Fraŭlino Tempo. En bela melodio aperas du dancantaj geknaboj: la knabo Hiaŭgjun tenas en la mano modelon de atomo kaj la knabino Hiaŭhong modelon de sputniko. Ili havas grandan idealon kaj nun serĉas tempon por la kvar modernigoj de la patrolando. Ili sukcesis trovi Fraŭlinon Tempon. Ŝi aldonas al ili orajn flugilojn, kio simbolas, ke ili jam gajnis tempon.

Ĝuste kiam ili ĝoje foriras, sursceniĝas petolema knabo Hiaŭkiang, kiu neniam domaĝas tempon. Li ĵetadas ŝtonetojn per katapulto kaj interpuŝiĝis kun Fraŭlino Tempo. Rimarkinte lian malĝentilecon kaj lian flankenĵetitan libro-



*La baletto "Kanto de Tempo"*



*Nacimuzika orkestro en ekzercado*



## En Pekino

# La monto Badaling

de GANG JUHUAN\*

**B**ADALING estas unu el la gravaj pasejoj de nia lando. Ĝi situas 45 kilometrojn nordokcidente de nia ĉefurbo Pekino. Ĝi estas fame konata kaj vizitata de turistoj dum la tuta jaro pro tio, ke unu parto de la Granda Muro trapasanta tiun lokon estas bone konservata ĝis nun.

La Granda Muro estas unu el la grandaj konstruaĵoj fame konataj tra la mondo. Ĝi havas historion de pli ol 2,200 jaroj. La feŭdaj estroj de la regnoj Kin, Jan Ĝaŭ kaj Vej en la Periodo de Militantaj Regnoj respektive konstruis sian parton de la muro ĉe siaj nordaj krutaj landlimoj por sin defendi kontraŭ subita atako de la nordaj nomadaj naciecoj. Post la unuigo de Ĉinio la Unua Imperiestro de Kin kunligis la grandajn murojn de

la nomitaj regnoj, per 300,000 homoj dum pli ol dek jaroj. La kunligita Granda Muro komenciĝas de Lintaŭ de Gansu-provinco en la okcidento, iras laŭ la montaro Jinŝan norde de la Riverkurbo de la Flava Rivero, kaj finiĝas oriente en Liaŭning-provinco. Ĝi longas pli ol 5,000 kilometrojn.

Dum la pli ol 1,800 jaroj de Kin-dinastio ĝis Ming-dinastio (1368-1644 p. K.), la feŭdaj dinastioj plurfoje ĝin longigis kaj riparitis. Precipe la konstruado en Ming-dinastio, kiu daŭris pli ol cent jarojn, longigis la originan Grandan Muron kaj aldonis al ĝi novajn partojn ĉe iuj lokoj. La nuna Granda Muro ĉe Badaling estis konstruita de Ming-dinastio.

La Granda Muro de Ming-dinastio kun longeco de 6,350 kilometroj

komenciĝas okcidente de Giajuguan-pasejo en Gansu-provinco kaj finiĝas oriente je Ŝanhajguan-pasejo en Hebej-provinco. Ĝi trapasas sep provincojn kaj aŭtonomajn regionojn, inkluzive de loesa altebenajo, dezerto, altaj montoj kaj riveroj. Sub tiamaj materiaj kondiĉoj, la konstruado de tiel granda objekto ja estis tre malfacila.

La murego estas dividita de Ŝanhi-provinco en du partojn. La okcidenta konstruiĝis el ramita tero, sen brika eksteraĵo. Ĝi baze larĝas 4 metrojn, supre 1.6 metrojn kaj altas 5.3 metrojn. La orienta konstruiĝis interne el ramita tero kaj ekstere el brikoj kaj ŝtonoj. Badaling estis tre grava loko por defendi la ĉefurbon Pekinon, tie la Granda Muro konstruiĝis baze el ŝtonegoj kaj supre el grandaj brikoj.

sakon, ŝi sentas grandan doloron en la koro. Ŝi admonas, ke li domaĝu tempon kaj lernu sciojn. Sed Hiaŭkiang donis neniam da atento. Li laciĝis post petolado kaj ekdormis sub granda arbo. Tiam oni aŭdas urĝan melodion, kiu simbolas forflugon de tempo. Hiaŭkiang vekigis, li salte leviĝas de surprizo: Li jam fariĝis maljunulo kun blanka barbo. Li tre maltrankviliĝas kaj ĉiamaniere klopodas por rejuniĝi, sed tute vane. Li neniam rejuniĝos. Ekmemorinte la admonon de Fraŭlino Tempo, li esploras de pento. Ĝuste tiam resursceniĝas Hiaŭjun kaj Hiaŭhong en

kosmonaŭta kostumo. Ili ĝoje sciigas al Fraŭlino Tempo, ke ili gajnis novajn sukcesojn en scienco.

«Kanto de Tempo» estas tre ŝatata de infanoj, ĉar ĝi komprenigis al ili, ke en la mondo la plej kara ja estas tempo. Iuj knaboj ofte ellitiĝis malfrue kaj malfruiĝis en iro al sia lernejo kaj iuj estis nelernemaj. Sed post rigardo de la baleto, ili ĉiuj ŝanĝiĝis, ili ellitiĝas frue kaj lernas tre diligente. Kiam oni demandis al ili kial ili subite ŝanĝiĝis, ili respondis, ke ili timas fariĝi «blankbarbulo».

La orienta parto de la Granda Muro estas pli alta kaj pli dika ol la okcidenta. Ĝi larĝas baze 6 metrojn, supre 5.4 metrojn kaj altas 8.7 metrojn. Kvin ĉevaloj aŭ dek homoj povas marŝi sur ĝi en unu vico.

Oni instalas al la murego militalarmajn brulsignalejojn kun interdistanco de 70-150 metroj, aŭ ĉe la muro aŭ sur apudaj montoj, kun kvadrata supraĵo ĉiuflanke larĝa je 8 metroj. Ili altas 12 metrojn kaj uzigiĝis kiel alarma signalejo por gvati malamikojn. En antikveco mankis telefono. Por rapide transdoni alarmon pri atako de malamikoj, oni bruligis fekaĵojn de lupo sur signalejo, kaj la garnizonantoj sur la najbaraj signalejoj faras la samon tuj post ekvido de tio kaj tiamaniere alarmo povas rapide transdoniĝi al loko fora je mil kilometroj en kelkaj horoj, kaj necesa defenda aranĝo povis esti farita


ĝustatempe. Oni konstruis sur la Granda Muro parapeton, krenelojn, gvattruojn, paftruojn kaj aliajn. Duetaĝaj gvataj fortresoj distancaj je pli ol 100 metroj unu de alia estas konstruitaj sur ĝi. La supra etaĝo servis por posteni kaj la mal-supra por konservi provianton, armilojn, municion kaj loĝigi soldatojn. Sur la murego troviĝas ankaŭ drenaj sulkoj kaj defluiloj. Ĉion ĉi tion oni povas vidi sur la Granda Muro de Badaling.

Al la Granda Muro de Mingdinastio oni konstruis pasejajn urbojn distancajn je 7.5 kilometroj unu de alia. Iliaj grandecoj estis malsamaj laŭ ilia situo kaj graveco en strategio. La famaj pasejaj urboj estas Ŝanhajguan, Giajuguan, Pinghingguan (en Ŝanhi), Janmenguan (en Ŝanhi) kaj Badaling. Badaling estas tre proksima al la ĉefurbo kaj ankaŭ tre grava, tial oni konstruis pasejan urbon ne nur tie, sed ankaŭ pasejajn urbojn Ŝangguan, Gjujong-

guan, Nankou sur la vojo kondukanta al la ĉefurbo kiel la duan, trian kaj kvaran defendliniojn de la ĉefurbo.

Por veturi de Pekino al Badaling per trajno, oni devas trapasi unue Nankou. Tiu paseja urbo en formo de trapo, kun vojo trapasanta la sudan kaj nordan trapajn pintojn, situas inter du montoj. Norde de Nankou, staras la alta Janŝan-montaro. En antikveco tie troviĝis nur kruta vojeto, kiun defendatan per unu homo eĉ dekmil militistoj ne povis trapasi. Nun la vojeto jam transformiĝis en asfaltan ŝoseon, kaj tie trapasas ankaŭ la fervojo de Pekino al Interna Mongolio.

Gjujongguan troviĝas je 3.5 kilometroj norde de Nankou. Ĝi estas ĉirkaŭata de altaj montoj ombrataj de arboj kaj strategie tre grava. King-dinastia imperiestro donis al ĝi la titolon "Gjujongguan en Verdajoj", kaj elektis ĝin kiel unu el la ok vizitindaj pitoreskejoj de la



*La Granda Muro*

ĉefurbo. En la centro de la ovala urbo de Gjujongguan troviĝas teraso masonita el blanka marmoro, antaŭe sur ĝi estis tri lamaaj pagodoj, kiuj bedaŭrinde jam detruigis. Sub la teraso troviĝas pordo, sur kies flankaj ŝtonoj gravuriĝis elefantoj, drakoj kaj boadoidoj. Sur la ŝtonaj muroj en la pordo gravuriĝis vivecplenaĵoj de la Kvar Ĉielaj Generaloj. Kaj inter tiuj figuroj gravuriĝis dharani-sutro en la sanskrita, ŝiŝiaa, mongola, tibeta kaj hana lingvoj. Ĝi estas valorega materialo por esplori antikvajn lingvojn de Ĉinio kaj budhajn sutrojn. Tiuj artaĵoj de Juan-dinastio (1206-1368 p. K.) estas alte taksataj de ĉinaj kaj fremdlandaj turistoj.

En montoj kvar kilometrojn norde de Gjujongguan troviĝas la malgranda ovala Ŝangguan-urbo, ĉe kiu eĉ malmultaj militistoj povis bari multajn malamikojn. En ĝia najbareco troviĝas la Liuta Ravino, kiu ricevis tiun nomon pro la muziko de akvofluo malsuprenfluanta de altaĵo. Alveninte tien turistoj senescepte haltas por aŭskulti la belajn sonojn.

De tie plu antaŭen, la trajno veturas en etan valon kie sin trovas la stacio Kinglongkiaŭ. Apud ĝi staras bronza statuo de Ĝan Tianjoŭ, eminenta fervoja inĝeniero de nia lando. En 1909, kiam imperiistoj tiranis en Ĉinio, la Pekina-Ĝangiakoŭ-a Fervojo, kiun oni planis finkonstrui en 6 jaroj, malfermiĝis al trafiko post kvarjara

konstruado, dank' al klopodo de Ĝan Tianjoŭ kaj la fervoj-konstruantoj, kaj la konstrua kosto estis nur kvinono de tiu taksita de fremdlandaj inĝenieroj. Krome li inventis ĉinan vagonan kuplilon kaj per tio faris sian kontribuon al la fervoja tekniko. Descendinte trajnon kaj piedirinte de la stacio ĉ. unu kilometron nordokcidenten, oni povas atingi Badaling — la plej altan lokon de la Granda Muro kaj la avanan postenon de la kvar pasejuroj. Tie la montoj estas tre krutaj, kaj sur rokuro troviĝas engravuritaj vortoj "Natura Gardejo". En Ming-dinastio oni tie konstruis du pasejajn postenojn, sur la orienta posteno estas tabulo kun la surskribajo "Posteno ekster Gjujongguan" kaj sur la okcidenta posteno "Ŝlosilo de Norda Ŝanhi". En antikveco la loko estis tre grava pasejo gardata de multaj militistoj. Kiam turistoj ascendis la plej altan lokon, antaŭ ili prezentiĝas sennombraj montoj similaj al ondoj en la maro, kaj la Granda Muro aspektas kvazaŭ giganta drako, naĝanta al la ĉiela fino en senlima maro, kies kapon kaj voston oni ne povas vidi. Tion vidante oni nature sentas ekstazon pro la majesteco de la naturo kaj admiron al la granda kreivo de la antikva laboranta popolo en konstruado de la Granda Muro.

\* La aŭtoro estas laboranto en la Institucio de Natur-sciencita Historio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj.

(Daŭrigo de la paĝo 40)  
Gujgoŭ, Guanghi kaj aliaj provincoj, ĉar ĝi konformis al la volo de la popolo. Vidinte, ke la regado de Juan jam estis netenebla, la imperiistoj, kiuj origine subtenis Juan Ŝikaj, tiam nur povis forlasi tiun instrumenton. Ankaŭ la subuloj de Juan lin perfidis unuj post aliaj

por sin elsavi je alproksimiĝo de la lasta tago de sia astro. En marto de 1916, Juan devigite abolis la aŭtokration. De la imperiestriĝo de Juan Ŝikaj ĝis la abolo de la aŭtokratio estis nur 83 tagoj. En la 6-a de junio Juan Ŝikaj mortis en malespero.



POST la malsukceso de la Revolucio de 1911, Ĉinio eniris en la periodon de regado de la nordaj militaristoj kun Juan Ŝikaj kiel la ĉefo. Tiam, Juan praktikis barbaran militaristan diktaturon al la popolo. Li dronis en sonĝo pri imperiestriĝo, publike renversis la respublikan reĝimon kaj restaŭris la feŭdan aŭtokration.

Juan Ŝikaj (1859-1916) naskiĝis en Hiangĉeng-gubernio de Henan-provinco. En la komenco, li estis nur malalta oficisto de la registaro de King-dinastio. Post la Ĉina-Japana Milito de 1894, li fariĝis estro de la Nove Konstruita Infanterio kaj de tiam komencis sian politikan aktivadon. En la komenco de la 20-a jarcento, Juan funkciis kiel ministro de la registaro de King-dinastio kaj la de li gvidata Nove Konstruita Armeo estis alinomita Norda Armeo. Sekve de la disvastiĝo de tiu armeo, paŝon post paŝo formiĝis armita politika kliko kun Juan Ŝikaj kiel la ĉefo — la kliko de nordaj militaristoj. Per tiu kapitalo kaj subtenate de en- kaj eksterlandaj reakciaj fortoj, Juan Ŝikaj strangolis la Revolucion de 1911 kaj uzurpis la postenon de provizora prezidanto.

Post sia enoficiĝo en Pekino, devigite de la siatempa situacio, Juan Ŝikaj ne povis ne esprimi lojalecon al al respublika reĝimo. Sed efektive li klopodis plenenergie por ĝin subfosi kaj praktikis diktaturon. Li intence subfosis la elektan sistemon de la registaro, nomumis sian konfidenculon ĉefministro kaj uzis lin

# La imperiestriĝa sonĝo de Juan Ŝikaj

de SI GIN

kiel sian instrumenton. Aliflanke, li rigardis Sun Jatsen kaj aliajn revoluciulojn kiel grandan obstaklon por lia diktaturo kaj ĉiamaniere klopodis por forigi ilin. Tiam, la Ligo Tong Meng Huj gvidata de Sun Jatsen ankoraŭ tenis en siaj manoj kelkajn provincojn de suda Ĉinio kaj parton de la armeo, kaj en la provizora konsilantaro de Pekino tenis absolutan superecon. En la fino de 1912, laŭ kondiĉo de la "Provizora Konstitucio" komenciĝis la elektado de oficiala parlamento. Song Giaŭĵen, la efektiva respondeculo de la Ligo Tong Meng Huj, provis gajni la plimulton de la sidlokoj de la parlamento en la elektado por efektiviĝi en Ĉinio partian politikon kiel en okcidentaj landoj. Pro tio, li organizis la Ligon Tong Meng Huj en Kuomintangoj kaj varbis tre multajn burokratojn kaj politikistojn por vastigi tiun organizon. Fine, Kuomintangoj vere gajnis la plimulton de la sidlokoj en la du ĉambroj de la parlamento. Song Giaŭĵen tre ĝojis kaj jam konsideris sin kiel estontan kabinetan ĉefministron. Sed la avida Juan Ŝikaj ne povis toleri tion. En marto de 1913, Juan murdis Song Giaŭĵen en Ŝanhajo per sekreta spiono kaj kreis la "aferton de Song" kiu skuis la tutan landon.

En la komenco de la Revolucio de 1911, Sun Jatsen estis trompita de Juan Ŝikaj kaj misopiniis, ke Juan vere praktikos demokration.

La murdo de Song malkovris al li la diablan vizaĝon de Juan kaj li firme proponis batali per armeo kontraŭ Juan. Tamen, pro diverĝo de opinioj en Kuomintangoj, la agado ne povis esti rapide komen- cita.

Kiam Kuomintangoj ankoraŭ hezitatadis, la glavo de Juan Ŝikaj jam ekfalas al revoluciuloj. En junio de 1913, post ricevo de granda sumo da pruntmono de imperiistoj, Juan ordonis ekigi la Kuomintangajn provincestrojn en Gianghi, Anhuĵ kaj Guangdong kaj sendis trupojn suden. Tiam, Kuomintangoj devigite ekbatalis kontraŭ la atakantojn. En la 12-a de julio, Li Liengjun en Gianghi deklaris bataladon kontraŭ la krimulo Juan. Tri tagojn poste ankaŭ Huang Hing en Nankino ekmovis siajn trupojn al batalo. Kaj kelkaj provincoj de suda Ĉinio proklamis sendependiĝon unu post alia. Sed en malpli ol du monatoj la trupoj batalantaj kontraŭ Juan estis venkitaj kaj la potencosfero de Juan Ŝikaj vastiĝis ĝis la meza kaj malsupra baseno de Jangzrivero. Tiu batalado kontraŭ Juan estas nomita en la historio la "Dua Revolucio".

Post la ekstermo de la armitaj fortoj de Kuomintangoj, Juan Ŝikaj komencis solvi la problemon de la parlamento. Kvankam li malŝatis la parlamenton, tamen li ankaŭ bezonis ĝin por ke ĝi helpu lin fariĝi

oficiala prezidanto. Je la 6-a de oktobro, la parlamento okazigis la elektadon de prezidanto. Juan sendis milojn da alivestitaj policianoj sub la nomo de "grupo de civitanoj", kiuj ĉirkaŭis la kunvenejon kaj kriaĉis ke "se ne elektigos la dezirata prezidanto, la elektantoj ne estos permesitaj fari eĉ unu paŝon for de la kunvenejo". Kaj de la oka matene ĝis la deka vespere, la parlamentanoj manĝis nenion, kaj Juan Ŝikaj estis elektita post trifoĵaj voĉdonoj. En la deka de oktobro, Juan enoficiĝis kiel oficiala prezidanto. Post nelonge, li ordonis malorganizi Kuomintangon kaj la parlamenton. Kaj la parlamento, unu el la simboloj de la respublika reĝimo, estis tute detruita post sia ekzisto de malpli ol unu jaro.

"La Provizora Konstitucio" estis frukto de la Revolucio de 1911 kaj ĝia kondiĉo pri elekta sistemo de prezidanto estis maloportuna por la diktaturo de Juan. Juan Ŝikaj unue ĝin subfosis kaj poste ĝin nuligis. En majo de 1914, li ordonis aboli "La Provizoran Konstitucion" kaj ĝin anstataŭigis per "La Konstitucio de la Ĉina Respubliko". Tiu "konstitucio de Juan" abolis la ĉefministron kaj la parlamenton, kaj kondiĉis ke la prezidanto posedas potencon kiel tiun de imperiestro. Li reviziis la leĝon de elektado de prezidanto ke la funkcia periodo de prezidanto fariĝis 10 jaroj, oni povas esti reelektita je senfine multaj fojoj, kaj la sekvanta prezidanto devas esti rekomendita de la funkcianta prezidanto. Tiamaniere, ne nur Juan Ŝikaj povus fariĝi dumviva prezidanto, sed ankaŭ liaj filoj povus heredi lian prezidantecon. Krome, li ankaŭ restarigis la titolojn de feŭdaj oficoj en la centra kaj la lokaj registaroj. Ĉio tio malkaŝis la ambicion de Juan Ŝikaj pri restaŭro de aŭtokratio.



*Informiĝinte ke Juan Sikaj devigite abolis aŭtokration en marto de 1919, Sun Jatsen kaj aliaj kunvenis en Japanio por celebri ĝin.*

Unuflanke Juan Sikaj restaŭris aŭtokration, aliflanke li diris al aliaj: “Mi ne volas fariĝi imperiestro nek ŝatas esti prezidanto.” Tio spegulis lian hipokritecon. Por efektiviĝi sian imperiestriĝan sonĝon, li ĉiamaniere klopodis por akiri subtenon de imperiistoj. En julio de 1914, eksplodis la Unua Mondmilito. Kun la preteksto de deklaro de milito kontraŭ Germanio Japanio sendis armeon al Ŝandong kaj okupis Kingdaŭ kaj la Kingdaŭ-Ginan-an fervojon. Kaj poste Japanio elmetis al Juan Sikaj la “Dudek Unu Artikolojn” por pereigi Ĉinion. Japanio publike esprimis al Juan, ke se li akceptos tiun agresan traktaton, Japanio subtenos lin por ke li fariĝu imperiestro. La naciperfidulo Juan Sikaj, kiu arde deziris imperiestriĝi, akceptis la “Dudek Unu Artikolojn” nur kun la postulo, ke pri iuj artikoloj interkonsiliĝo estu farata en la estonteco. Krome, Juan Sikaj akiris subtenon ankaŭ de Germanio kaj Usono.

Subtenate de la mastroj, Juan Sikaj publike praktikis aŭtokration. En aŭgusto de 1915, Frank J. Goodnow, usona konsilanto de Juan Sikaj, skribis artikolon “Respubliko kaj Aŭtokratio”, en kiu li kalumniis,

ke tro malalta estas la klereco de la ĉina popolo, tial en Ĉinio ne konvenas praktiki respublikon kaj nur aŭtokratio povas esti praktikata. Tiam Jang Du kaj aliaj 5 senhontaj politikistoj kaj intelektuloj aktive klopodis por la efektiviĝo de aŭtokratio. Liang Ŝiji, alia sekvanto de Juan, subaĉetis nombron da politikistoj, kanajloj, almuzuloj kaj publikulinoj kaj ilin organizis en diversajn “petgrupojn” por falsa “manifesto de popola volo”. Kaj per la helpo de siaj konfidenculoj en diversaj lokoj, li nomumis nombron da “popolaj reprezentantoj” kaj okazigis t.n. “elektadon de ŝtata reĝimo” por montri lian “demokration”. Rezulto de tio montris, ke la 1993 voĉdonintoj de la tuta lando “unuanime” voĉdonis por aŭtokratio kaj “elektis” Juan Sikaj kiel “imperiestron de la Ĉina Imperio”. En la 13-a de decembro, post ŝajniga gesto de nevolonteco, Juan Sikaj akceptis la gratulon de la korteganoj. En la 31-a de decembro, li ordonis aboli la titolon de Ĉina Respubliko kaj alinomis la 5-an jaron de la Ĉina Respubliko (1916) “1-a jaro de Honghian”. Li ankaŭ urĝe farigis imperiestran robon kun drakodesegno por soleni sian “surtroniĝon”. Tiamaniere, la respu-

bliko fondita post la Revolucio de 1911 estis renversita de Juan Sikaj post kiam li ĝin forte difektis per artifiko.

Kiam Juan Sikaj dronis en bela sonĝo de imperiestriĝo, la furioza tajdo de oponado kontraŭ li envolvis la tutan landon. La ĉina popolo jam ne povis toleri la krimojn de naciperfidulo Juan Sikaj kaj senĉese batalis kontraŭ li ĉiamaniere. Lia restaŭro de aŭtokratio pliindignigis la popolon. La popolo de ĉiuj socitavoloj kondamnis Juan kaj montris ke lia “naciperfida krimo meritas pli ol mortopunon”. Ankaŭ Sun Jatsen kaj aliaj revoluciuloj firme oponis kontraŭ Juan kaj publikigis kondamnan deklaron kontraŭ li, kaj en Ŝanhajo kaj aliaj lokoj organizis malgrandskalajn leviĝojn.

Sub la puŝado de la batalado de la tutlanda popolo kontraŭ Juan, Caj E, la iama provincestro de Junnan, organizis nacidefendan armeon, proklamis la sendependiĝon de Junnan kaj faris armitan bataladon kontraŭ Juan. Kvankam malgranda estis la forto de la nacidefenda armeo, tamen ĝi ricevis varman subtenon de la popolo de

*(Daŭriĝo sur la paĝo 38)*

## Antikva liĉiarbo

En Putian-gubernio de Fugian-provinco de Ĉinio kreskas liĉiarbo, kiu aĝas pli ol 1200 jarojn. Ĝi nomiĝas Songgiahiang (bongustajo de Song-familio). Nun ĝi ankoraŭ havas densajn branĉojn kaj foliojn kaj ĉiujare donas abundajn fruktojn.

En la monda historio de vegetaĵoj malofte troviĝas pli-ol-mil-jaraj fruktarboj kiel Songgiahiang.

La antikva liĉiarbo staras en la korto de Song-familia templo en la urbo de Putian-gubernio. En la jaro 1056, gustumante la liĉiojn laŭ invito, Ĉaj Hiang, fame konata kaligrafo de Norda Song-dinastio (960-1127 p. K.), improvizis versaĵojn por esprimi sian dankon kaj samtempe montris: "La liĉiarbo jam havas 300 jarojn. . . Nun kvankam ĝi maljuniĝas, tamen ĝiaj fruktoj estas pli kaj pli abundaj, sukoplenaj kaj bongustaj. Vere bona arbo ĝi estas." En sia verko "Pri Liĉioj", la plej frua fame konata verko pri kulturado de fruktarboj de nia lando, li speciale menciis Songgiahiang.


La antikva liĉiarbo altas je 6.43 metroj, ĝia krono vastas de sudo al nordo je 8.9 metroj kaj de oriento al okcidento je 7.17 metroj.

La fruktoj de tiu ĉi arbo havas regulan formon, la ŝelo estas helkolora, maldika kaj fragila, la karno dika kaj dolĉeco deca.


Songgiahiang famiĝas ne nur en Ĉinio sed ankaŭ ekster la lando. En la komenco de la kuranta jarcento, usona misiisto W. N. Brewster enkondukis de Putian-gubernio al Usono liĉiajn arbidojn kune kun

la kultura tekniko. De tiam fruktarboj, nomataj "liĉioj de Putian-familio" enradikiĝis en Florido kaj aliaj kelkaj ŝtatoj de Usono kaj pluraj landoj de la meza kaj suda Ameriko.

Nun oni jam plantis tri malgrandajn liĉiarbojn ĉirkaŭ la antikva liĉiarbo kaj ligis ilin kun la lasta per greftado por ke ili subtenu kaj nutru la maljunan arbon.



Liĉiarbo Songgiahiang



Liĉioj

## Rara animalo— krokodila lacerto

Krokodila lacerto (*Shinisaurus crocodilurus*) vivas nur en la Guanghi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono. Ĝi estas rara animalo

ne nur de nia lando sed ankaŭ de la mondo. Ĝi, kiel speco de amfibioj, loĝas en arbetaroj ambaŭborde de montvaloj kaj riveretoj. Ĝi ŝatas ripozi sur arbobranĉoj ŝajnigante sin dormanta, kaj surprizite ĝi tuj falas en akvon, poste surbordiĝas kaj kaŝas sin en ŝtonfendo. Tieaj loĝantoj nomas ĝin granda dormanta serpento aŭ hundo falanta en akvon. La krokodila lacerto longas je 30-40 centimetroj. Escepte de ĝia ronda kaj plata kapo, ĝi tre similas al la krokodilo de Jangzi-rivero.

Frue en 1928, kiam la kolekta grupo de la Zoologia Fakultato de Ĝongŝan-universitato de Guangdong-provinco venis al Da-ĵaŭ-monto de Guanghi por kolekti specimenojn de animaloj, ĝi unufoje trovis la nomitan animalon kaj faris el ĝi specimenon kaj nomis ĝin krokodila lacerto. La trovo vekis ĉe fremdlandaj zoologoj intereson kaj atenton. En zoologia klasifiko, krokodila lacerto apartenas al sola speciala specio. Nun ĝi estas trovebla nur en kvin brigadoj en meza parto de Guanghi.

En junio kaj julio de 1978, la kompila grupo de "Ĉina Faŭno" pri amfibioj venis al Da-ĵaŭ-monto de Guanghi por pluapase studi la krokodilajn lacertojn. Ili kaptis sume 130 krokodilajn lacertojn kaj fundamente konis iliajn vivkutimojn.

Lastatempe la Zoologia Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj donacis 4 krokodilajn lacertojn al la Liugoŭ-a Zoologia Ĝardeno de Guanghi kaj aliajn 13 krokodilajn lacertojn al la Pekina Zoologia Ĝardeno.





## INSTRUO DE FREMDAJ LINGVOJ EN ĈINIO

Por kontentigi la bezonon de konstruado kaj la ĉiam pliiĝanta internacia komunikiĝo, Ĉinio vaste disvolvas instruadon de fremdaj lingvoj.

En elementaj lernejoj kun necesaj kondiĉoj oni komencis instruadon de fremdaj lingvoj en la tria-jara klaso. Ekde la dua semestro de 1978, altaj lernejoj novigas instruajn materialojn fremdlingvaj kaj fremdlingvaj institutoj kaj fakultatoj kompilas instruajn materialojn konvenajn al sia instruado de fremdaj lingvoj. La ŝtato starigis nombron da dujaraj fremdlingvaj lernejoj por kulturi fremdlingvaj instruistojn por mezaj kaj elementaj lernejoj. En tri sinsekvaj jaroj ekde 1979, ĉiujare la ŝtato invitos 100 fremdlandajn instruistojn por trejni ĉinaj fremdlingvaj instruistojn por mezlernejoj kaj politeknikoj. Nun en Ĉinio oni ĉefe instruas la anglan lingvon kaj krome ankoraŭ la japanan, francan, germanan, rusan kaj aliajn.

Krom instruado de fremdaj lingvoj en lernejoj, oni fondis postlaborajn fremdlingvajn kursojn. La Pekina Televido okazigas televidan instruadon, kiu estas samtempe transsendata en la 28 provincojn, municipojn kaj aŭtonomajn regionojn krom Tibeto kaj Tajvano.

Krome, niaj lokaj radiostacioj vaste faras instruadon de fremdaj lingvoj. Multaj registaraj institucioj, sciencaj institutoj, fabrikoj kaj minejoj fondis fremdlingvajn kursojn.

## ĈINA MATEMATIKISTO RICEVIS LA DAVIDSON-AN MEMORIGAN PREMION

42-jara matematikisto Hoŭ Ĝenting, profesoro de la Ĉangŝa-a Fervoja Instituto de Hunan-provinco de Ĉinio, publikigis sian disertaĵon en la 2-a numero de 1974 de «Ĉina Scienco». En ĝi li sukcese trovis la solvon pri la kriterio por unikeco de «Q-proceso», kiun matematikistoj esploris en la lastaj 40 jaroj. Pro tio li ricevis la Davidson-an Memorigan Premion de 1978.

Fonduso Rollo Davidson estis fondita por memori la forpasintan anglan junan probabliston Rollo Davidson kaj estas uzata por premii junajn matematikistojn, kiuj okupiĝis per esplorado pri la teorio de probableco kaj akiris eminentan sukceson. Profesoro Hoŭ Ĝenting estas la unua matematikisto de Ĉinio, kiu ricevis la premion. La teoremo pri unikeco de Q-proceso trovita de li estis nun nomita kiel

«Teoremo de Hoŭ». Ĝi estas aplikata en kalkulado de misila orbito, en prognozo de tertremo kaj meteo kaj en esplorado de biologia genotiko kaj aliaj.

## FERVOJO EN SUDA HINGIANG EN STREĈA KONSTRUADO


La unua fervojo etendiĝanta en la sudan parton de Hingiang de nia lando estas en streĉa konstruado. Ĝi longas 474 kilometrojn, komenciĝas de Turfan apud Urumĉi, la ĉefurbo de Hingiang, transpasas branĉon de Tianŝan-montaro kaj sude finiĝas en Korla. Ambaŭflanke de la fervojo estas multaj montoj, profundaj valoj, komplikaj formacioj kaj la klimato estas kaprica.

La konstruado komenciĝis en 1971 kaj nun oni jam sternis ĉ. 270 kilometrojn da trakoj kaj la parto de 114 kilometroj inter Turfan kaj Ju-ergoŭ ĉe piedo de Tianŝan-montaro malfermiĝis al trafiko je la 1-a de aprilo, 1978.

## NIANĈU-RIVERO DE TIBETO ESTAS EN ORDIGADO

En junio de 1978 komenciĝis la sinteza ordigado de Nianĉu-rivero,

*La fervojo konstruata en suda Hingiang*





kiu estas granda agrikultura irigacia sistemo en Tibeto. En la ordigado 108 kilometroj da riverkurbiĝoj de ĝia ĉefa fluo estos rektigitaj kaj masonitaj el ŝtonoj, krome oni konstruos pli ol 20 kompletigajn objektojn, inkluzive de trunkaj kanaloj, akvokonservejoj, malgrandaj hidroelektrejoj kaj aliaj.

En 1985, post la ordigado de la irigacia sistemo, pli ol 7,000 hektaroj da virga tero estos ŝanĝitaj en kompojn kaj la kampoj ambaŭflanke de la rivero fundamente ricevos irigacion. Dank' al tio la baseno de Nianĉu-rivero kun areo de 11,900 kvadrataj kilometroj fariĝos unu el la gravaj bazlokoj de greno de Tibeto.

## ĈINIO PARTOPRENOS EN TERGLOBA ATMOSFERA ESPLORADO

Ĉinio jam decidis partopreni en la unua tergloba atmosfera esplorado organizita de la monda meteologia organizo. Ĝi estas la plej granda scienca esplora kunlaboro en la nuna internacia meteora sfero. La ĉefa tasko de nia lando en la aktivado estas liveri la enlande observitajn meteajn materialojn, sendi du meteosipojn al tropika maro por fari metean observadon kaj transdoni la observitajn informojn kaj materialojn. Nun la koncernaj oceana, meteora, trafika kaj aliaj departementoj de nia lando aktive faras preparan laboron.

La unua tergloba atmosfera esplorado estas farata en la periodo de decembro de 1977 ĝis novembro de 1979, la unua jaro estas prepara stadio kaj la dua estas efektiva.

## ĈINA HALTERLEVISTO ROMPIS UNU MONDAN REKORDON

Je la 7-a de oktobro, 1978, en la 52-kg-kategoria matĉo de la Tutlanda Halterleva Konkurso, 19-jara Vu Ŝude de Guanghi rompita en junula ŝiro per 105.5 kg. la mondan rekordon de 105 kg. tenitan de hungara sportisto.

La rekordo de Vu Ŝude superis, per tri kilogramoj, tiun kreitan de plenaĝuloj kaj junuloj de nia lando.



## Post reveno al Japanio

*Forpasis jam pli ol tri monatoj post kiam la Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj EPC-amikoj revenis al sia lando. Preskaŭ ĉiuj el ĝiaj membroj sendis al ĉinaj esperantistoj varmajn leterojn kaj fotojn faritajn dum la vojaĝo. Leginte la leterojn kaj rigardante la fotojn, ni kvazaŭ refoje renkontiĝus kun niaj japanaj amikoj en Ĉinio. Nu, kiel ili fartas, kaj kion ili faris kaj faros post sia reveno al la patrolando? Pri tio informis nin sekretario de la vizitgrupo S-ro Umeda Joŝimi en sia letero datita je la 10-a de oktobro, 1978.*

— La Red.

La 17-an de septembro 1978, vespere inter 20:00 kaj 20:30 (japana tempo), multaj esperantistoj tra Japanio atentis pri la disaŭdigo de Radio Pekino por aŭskulti la specialan programon pri nia vizitgrupo. Tio ĉi ne estas troigo, ĉar pri la elsendo perpoŝte sciigis Japana Esperanto-Instituto al siaj membroj, ricevinte la sciigon de Radio Pekino. Poste mi mem ricevis telefonvokon

de miaj gekonatoj kiuj aŭskultis la programon. Kelkaj el ili eĉ sendis al mi la kasetan bendon sur kiu estis registrita la 30-minuta elsendaĵo. Tiu programo certe malfermis al multaj el ili eblecon daŭre kontakti kun la Esperanta disaŭdigo de RP.

Aparte menciindas la fakto ke Japana Esperanto-Instituto decidis

rekomenci funkcii kiel la peranto de El Popola Ĉinio kaj aliaj ĉinaj Esperanto-eldonaĵoj. La novembra kaj decembra numeroj de EPC kun aparta raportaĵo pri nia vizitgrupo ankaŭ vekos grandan intereson inter japanaj esperantistoj kaj same en aliaj landoj.

En tia maniero kaj alia, mi ĝojas ke nia vizito kaj la sekvoj komencas efi kaj reeĥi en trafa direkto. Jen mallongaj raportoj pri unuopaj agadoj laŭ mia scio:

**S-ro Tokuda rokuro**, nia grupestro, faris raporton pri la vojaĝo en kelkaj lokaj grupoj; vizitis JEI en Tokio por transdoni la mesaĝon kaj donacaĵon de EPC; paroladis pri la renkontiĝo kun ĉinaj esperantistoj

ĉe JEI; kaj raportos pri la gvidantoj de ĉina Esperanto-movado ĉe Tohoku Kongreso de Esperantistoj en Tendo, Jamagata, okazonta post kelkaj tagoj.

**S-ro Koseki joŝio**, amanto de kaĉo matena kaj maŭtajo\* vespera, raportis pri la vojaĝo meze de septembro ĉe Zamenhof-Klubo, ĉiumonata kunside de veteranaj esperantistoj en Tokio; kaj parolos ĝeneralajn trajtojn de nia vizito ĉifoja ĉe la Tohoku Kongreso.

**S-ino Ozaŭa juki**, fratino de Verda Majo kaj fortika marŝanto, fariĝis tre okupita dank' al la favora pri-traktado de ĵurnalismo pri la vizito kaj renkontiĝo kun la genevoj; verkas artikolojn pri sia travivaĵo por diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj; sekvas ankaŭ intervjuoj radiaj kaj televidaj; kaj estas invitita al la celebra bankedo por la ĉina nacia festotago, aranĝita de Ĉina Ambasadado.

**S-ino Nakajima ĉizu**, modesta sed tre fervore scivolema observanto pri la ĉina virina vivo, faris raporton pri siaj observaĵoj al la membroj de sia loka grupo; verkas en esea formo artikolon por iu periodaĵo; kaj nun klopodas varbi novajn abonantojn de EPĈ.

**S-ro Nagaoka jiro**, serioza amanto-kritikanto de EPĈ kaj RP, estas okupita pro la preparlaboroj de la Tohoku Kongreso\*\* kiel ĝia motoro; verkis artikolon pri la vizito por la japanlingva revuo "Mondo de Esperanto"; kaj pretas montri kaj aŭdigi la diapozitivajn kaj sonbendojn.

**S-ro Takahaŝi tacuji**, fidela ĉasanto de bonaj fotindaj momentoj, komencis raportadon pri la vojaĝo jam unu semajnon post hejmen-reveno ĉe sia lernejo al la instruistoj kaj lernantoj; faris paroladon kun diapozitivaj kaj filmoj ĉe Hokajdo

Kongreso de Esperantistoj, kio rezultigis al li dek novajn abonantojn de EPĈ; kaj preparas prezenti la oficialan raporton al la supera instanco de sia lernejo.

**S-ino Saŭaĉi hisae**, verkistino entuziasma pri la postsignoj de Verda Majo, bone utiligas sian verkistan reputacion por publikigi la artikolojn pri la renkontiĝo de s-ino Ozaŭa kun la gefiloj de Verda Majo — jam aperis tiuj verkaĵoj en kelkaj influhavaj tagĵurnaloj kaj semajnaj kaj monataj gazetoj; okazis ankaŭ radia intervjuo; kaj pretas kunvoki la interesitojn por plilumigi kaj reliefigi la meriton de Verda Majo kunlige kun la japana-ĉina amikeca rilato.

**S-ro Harada ikuo**, nia oficiala fotisto kaj fervora biologo komparanta inter ĉinaj kaj japanaj araneoj, estas daŭre okupita dissendi fotojn al multaj ĉinaj kaj japanaj geamikoj; preparas kompili la albumon de selektitaj fotoj; estas elstara kaj mirinda sinoferanto kaj senavarulo, tial ĉar li certe elspezis multan sumon por tiuj fotofarado kaj sendado sed neniam postulas la rekompencan; kaj ankoraŭ pli pretas servi al siaj geamikoj en ambaŭ landoj.

**F-ino Nakamura masumi**, humurplena plezura kunparolanto sed akurata notofaranto, raportis al la direktoraro de la Oomoto-centro, kiun ŝi reprezentis ĉi-foje; parolis koncize pri la vojaĝo ĉe la Kongreso de Oomotanaj Esperantistoj en Kameoka; kaj verkis sufiĉe ampleksan artikolon por la japanlingva organo de Oomoto kaj Universala Homama Asocio, surbaze de sia abunda notaro.

**S-ino Kaneko haruhi**, progresinto en la ĉina lingvo kaj sekretariino de sekretario, faris raporton ĉe JEI por la direktoroj kaj redaktoroj; ordigis la kasetojn en Ĉinio registri-

tajn; dissendis al ĉiuj membroj la nomaron de ĉinaj geamikoj, kiujn ni renkontis en la urboj de ni vizititaj; kaj tradukis la artikolon de s-ro Cicio Mar aperinta en la "Popola Tagĵurnalo" en la japanan lingvon; ankaŭ daŭrigas reordigi la malnovajn ĉinajn Esperantaĵojn konservatajn ĉe la biblioteko de JEI.

**F-ino Isobe majo**, nia ĉarma amuleto kaj serĉanto de kuriozaĵoj, faris raporton pri siaj interesaj spertoj al siaj universitataj kolegoj-esperantistoj kaj ankaŭ ĉe la Internacia Renkontiĝo Esperantista 8-nacieca; kaj nun estas okupita en sia universitata vivo.

**Umeda joŝimi**, sekretario kaj ĝisosta ĝuinto de la vizito, estis daŭre ŝtopita de la laboroj vivtenaj sed povis fari etajn kontribuojn per raportado pri la grupo ĉe JEI, IRE kaj aliaj rondetoj, kaj per verkado de artikoloj por "Esperanto" (aperonta en la oktobra numero) de UEA kaj "La Revuo Orienta" (por novembra numero) de JEI; kaj preparas verki pli ampleksan artikolon por "Oomoto".

.....

Vere ni alvenis en via lando en la plej favora tempo, nome ke la subskribo de paca kaj amika traktato inter Japanio kaj Ĉinio estis ĵus farita. Tio estis la plej atendita momento por la ambaŭlandaj popoloj post dekoj kaj dekoj da jaroj de malfacilaj tempoj. Nia amikeco daŭros poreterne generacion post generacio. Same, mi estas certa, ke nia esperantista samideaneco ankaŭ pli multe kaj vaste progresos en nia amika kunlaborado.


.....


\* Maŭtaj-o estas ĉina fame konata alkoholaĵo.

\*\* La Tohoku Kongreso estis jam okazigita, en kiu dek abonantoj de El Popola Ĉinio estis varbitaj. — Laŭ letero de s-ro Nagaoka.

# *Por kulturi gedancistojn*

Rigardo al prezentado





Ekzercado de nacia danco



## *Por kulturi gedancistojn*

La Pekina Danca Instituto dividiĝas en mezgradan sekcion kun lernotempo de 6 jaroj kaj altgradan sekcion kun lernotempo de 3 jaroj, kaj tie instaliĝas du fakultatoj nome baleto kaj naciaj dancoj. Post la fondiĝo de nia popola respubliko la instituto elkulturis multajn dancistojn, el kiuj iuj eĉ akiris grandan renomon. Ĉi tie prezentiĝas fragmentoj de ilia lernado kaj prezentado.



En fundamenta ekzercado



"Knabino kun Alumetoj" prezentata de Lernantino



Sceno el la baleto "Cigna Lago" prezentata de Lernantoj





"Lotusflora Danco" ludata de lernantoj





Plenigo de maro fare de Ging Vej

# Silkajaj homfiguroj

La silkaja homfiguro alinomiĝas belarta homfiguro kun skeleto el fera drato, bambuo kaj ligno, kaj korpo kaj vestoj el papero, krepo, tulo, tafto, kotonŝtofo k.a. Ĝi estas delikata kaj versimila.

Verki poemon



Liang Hongju








Gou Ju



Mu Gujing

Caj Vengi



# Poŝtmarkoj



Por varme celebri la subskribon de la Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis, je la 22-a de oktobro, 1978, kompletan da memorigaj poŝtmarkoj. La surskribaĵoj kaj desegnaĵoj de la du poŝtmarkoj montras la komunan deziron de la ĉina kaj japana popoloj amike kunvivi de generacio al generacio.



*Kajto kun Sun Vukong*



*Papilia kajto*

La kajto havas historion de miloj da jaroj en Ĉinio. Ĝi, kiel metiartaĵo, estas senĉese reformita en farado, pentrado kaj iudo.

# Kajtoj



Striga kajto



Hirunda kajto



Vesperta kajto

Kajtoludo estas unu el la popularaj amuzaj aktivadoj en Ĉinio. Vintro kaj printempo estas tre bonaj sezonoj por kajtoludo. En antikveco oni nomis ĝin

milvo, ĉar fluganta kajto tre similas al milvo. Poste oni aldonis al ĝi arkon kun kordo kiu povas sonadi en vento.

